

MEGYEI KÖNYVTÁR
GÓTARJÁN

HUNGARA VIVO

6
1983
13,– Ft

VIA KUNLABORO ESTAS NIA FORTO
VI PLANAS, NI FABRIKAS



Ni entreprenas kompletan fabrikadon kaj surlokan muntaĝon de instalaĵoj por hotelĉambroj kaj komuncelaj ejoj, enlande kaj eksterlande

bubiv

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u.6. H-1081
Poŝta adreso: Budapest
Pf.193. H-1368
Aperas dumonate
XXIIIa jaro, 1983 n-ro 6
(112)

ENHAVO

Princz, O.: Sociaj kaj lingvaj aspektoj de la moderna komunikado 202
Barcsay, Zs.: — *Behrmann*, H.: Por pli efika instruado 205
Sipkov, B.G.: Pri la teatraj programoj 207
Nacilingva informado pri la 68a UK 211
Kovács, M.: Alveninte el Vjetnamio... 211
László, I.: Departemento Bács-Kiskun 212
Poemoj de Mihály Babits *(K.Kalocsay)* 214
Bálint, Sz.: Zigzage inter kongresanoj 216
Pago de Originala Poezio 218
Kongresa Panoramo 219
Esperantaj libroj el Hungario 223
Nagy, Á.: Tri jardekoj por la moderna hidrotekniko *(E.Fenyvesi)* 227
Monostori, E.: Prezentas sin la Entrepreno por Fabrik- kaj Masinmuntado *(E.Fenyvesi)* 231
Recenzoj de *V.Benczik* kaj *B.Kolker* 237
Fenyvesi, E.: Gaja pago 238
Krucenigmo, Ekzameno sen risko 238

Sur la frontpago: Katolika pregejo en Kalocsa (Foto de Z.Fejér)

Pluaj raportoj...

pri la 68a Universala Kongreso plenigas grandparte tiun ĉi jarfinan numeron, kiu kompletigas la 23an jarkolekton de nia revuo. El tiuj raportoj meritas distingitan atenton sendube la pritraktado de la kongresa ĉeftemo, ja tio ĉifoje ne estis nur esperantista aranĝo — prelegis ankaŭ ses elstaraj neesperantistaj fakuloj. La pritraktado de la kongresa ĉeftemo estis unu el la ĉefaj aranĝoj de la Monda Komunika Jaro en Hungario.

La artikolo pri la Tago de la Lernejo trovos atenton verŝajne ne nur ĉe pedagogoj, sed ankaŭ ĉe aliaj esperantistoj, ja multaj el ni okupiĝas pri la instruado de Esperanto ankaŭ sen instruista diplomo.

En tiu ĉi numero legeblas la dua parto de la raporto pri la teatraj eventoj de la UK, kaj aperas ankaŭ imponaj ciferoj pri la gazetara eĥo de la kongresaj eventoj. Szilárd *Bálint* intervjuis hazarde elektitajn kongresanojn — ne nur pri la UK kaj Hungario, sed ankaŭ pri temoj pli ĝeneralaj.

El la regionoj de Hungario ĉifoje ni prezentas departementon Bács-Kiskun, ni omaĝas al la poezio de Mihály *Babits*, okaze de la centjara datreveno de lia naskiĝo, kaj aperas ankaŭ originalaj poemoj, kiuj lastatempe ne abundis sur la paĝoj de nia revuo.

En tiu ĉi numero denove ni prezentas al la legantoj la liston de la Esperantaj libroj, eldonitaj en Hungario. Temas pri listo vere ampleksa, en kiu ne estos malfacile trovi libron por ĉiu gusto. Ni ne sekretigas, ke la librolisto aperas por veki la apetiton pri niaj eldonaĵoj: okaze de la Esperanta Librotago aŭ por Kristnaska donaco ne hezitu do elekti almenaŭ unu el la pluraj dekoj da libroj.

Ekde la venonta numero ni revenos al niaj kutimaj stilo kaj proporcioj, kiujn ĉijare iom modifis la UK en Hungario — do, fine de februaro oni jam atendu numeron kun ĉiuj kutimaj rubrikoj kaj stilo pli sobra.

SOCIAJ KAJ LINGVAJ ASPEKTOJ DE LA MODERNA KOMUNIKADO

Pritrakto de la kongresa ĉeftemo

En la Monda Komunika Jaro 1983 — deklarita fare de Unuiĝintaj Nacioj — Universala Esperanto-Asocio ligis la ĉeftemon de la 68a UK al la celoj de la Monda Komunika Jaro t.e. «Sociaj kaj lingvaj aspektoj de la moderna komunikado».

La Estraro de UEA kaj la Loka Kongresa Komitato iniciatis por la ĉijara kongreso — malsimile al la tradicio — aktivigi ankaŭ neesperantistajn fakulojn de komunikado por altnivele pritrakti la komunikadon, la novan fenomenon de la nuntempo. (Finfine neesperantistaj fakuloj partoprenis nur el Hungario, entute 6 personoj.)

Sekve de ĉi tiu decido oni devis certigi ankaŭ interpretilojn por la Esperanton ne parolantaj fakuloj.

Ĉi tiu eksperimento estis tre grava paŝo por propagandi Esperanton inter tiuj instancoj, kiuj perceptas la lingvajn problemojn, tamen ne konas Esperanton kiel solvon de ĉi tiu problemo.

La hungara preparkomisiono plurfoje konstatis la mankon de neesperantistaj fakuloj alilandaj; malgraŭ tio ni devas konstati la altnivelon de la prelegoj. Aparte estas akcentindaj la prelegoj de H. Frank, H.D. Maas, B.A. Sherwood, A.P.M. Witkam, kaj de la hungaroj L.Deme, G. Gordos, E.Gömbös, A. Münnich, T. Szecskő, F. Valter.

Jen, kelkaj ciferoj por montri la dimensiojn de la konferenco: partoprenis 28 prelegantoj el 10 landoj, la konferenco daŭris 18 horojn en du ĝeneralaj kaj en tri sekciaj kunsidoj. Krom la fakkunsidoj apartenis al la ĉeftemo kompreneble ankaŭ la inaŭgura prelego de Richard E. Butler, ĝenerala sekretario de Internacia Telekomunika Unio (ITU). La prelegojn kaj la tiujn sekvantajn debatojn vizitis entute preskaŭ 800 kongresanoj. Se ni aldonas ankaŭ la partoprenantojn de la inaŭguro, ni povas diri ke pli ol kvinmil esperantistoj konatiĝis — pli-malpli profunde — kun la ĉeftemo.

La prelegantoj tuŝis la temon el tri vidpunktoj: la plimulto de la fakuloj parolis pri la teknikaj aspektoj de la komunikado, la dua grupo pri la sociaj rilatoj, kaj la aliaj pri la lingvaj problemoj.

En la inaŭgura prelego R.E. Butler emfazis, ke «Interkomunikado estas ŝlosila faktoro en la socia, ekonomia kaj kultura evoluo de la nacioj kaj por kompreno inter la popoloj... La mondo de la komunikado estas akre konscia, ke nuraj teknikaj rimedoj ne donas efikan komunikadon. Devas troviĝi almenaŭ du homoj por ekkomunikado, kaj ni ĉiuj scias, ke se tiuj du homoj ne komprenas la parolon unu de la alia, ne realiĝas komunikado.»

Prelegas M. Isajev el Sovetio

R.E. Butler eĉ ne aludis, kiu lingvo plenumu la taskon de internacia komunika lingvo, do estis nature, ke kelkaj konferencanoj diskutis pri tio. Antal Münnich, analizante la interrilatojn de la komunika tekniko kaj la evoluo de la socio, konstatas: la dudeka jarcento alportis la radiadon, televidadon kaj teletekstadon. Tiuj ĉi telekomunikaj teknikoj ne respektas la landlimojn, kaj ili kreis la internaciismon, la penson pri la unueco de la homaro. Tiu ĉi internaciismo ebligis, ke du lingvoplanoj — Volapuko kaj Esperanto — fariĝis vivantaj lingvoj. Tamen Volapuko en la praktiko montriĝis ne konvena por la aplikado sur la plej diversaj kampoj de la vivo, el la planitaj lingvoj taŭgas nur Esperanto.

La ĝenerala sekretario de ITU ankaŭ okupiĝis pri alia tereno de lingvouzo: «Multaj... lingvoj estas uzataj por apartaj celoj, kiel komputila programado, rego de ciferuzaj maŝinoj ktp., kaj la bezono de universala lingvo ĉi-rilate eble ankoraŭ ne sentiĝas.» Pluraj fakuloj ankaŭ diskutis pri tio. Ekzemple H.M. Maitzen post la analizo de hom-maŝina dialogo almontras la barojn de uzebleco de «naturaj» lingvoj, sekve de la ofteco de la hononimoj «Komplikiga faktoro estas la apero de homofonoj en tiuj (t.e. historie kreskintaj) lingvoj, do la reprezentado de du aŭ eĉ pluraj mal-

samaj vortoj per unusola parolata ensemblo de fonemoj, kio kaŭzas la neceson konsulti la kuntekstan signifon por forigi la ambiguecon. Tia postulo evidente transiras la kapablon de la komputoro, kiu ne povas egaliĝi al la homa cerbo (almenaŭ nuntempe)».

A. Münnich opiniis, ke komputistoj agnoskas la bezonon de la unueca «planita lingvo» normale «La komputisto uzas planlingvojn por programi la komputilon, kaj scias per propra sperto, ke ili bone funkcias, kaj ke ekzemple la lingvoj Basic kaj Algol 68 estas nek egale facilaj, nek egale esprimivaj.»

La prelegantoj traktintaj la teknikajn aspektojn de la komunikado esploris multajn rilatojn de ĉi tiu temo. A.P.M. Witkam, nederlanda inĝeniero, gvidanto de la projekto DLT (distribuita lingvotradukado) pritraktis aspektojn kaj perspektivojn de Esperanto kiel bazo de pontolingvo interne de komputorsistemoj kaj tradukretaroj. Li emfazis, ke la interlingvo de perkomputila traduksistemo devas esti tute libera de leksikaj kaj sintaksaj ambiguaĵoj. La interlingvo, kiun projektas BSO por sia sistemo, tial ne estas la ordinara Esperanto, sed ĝia modifita varianto. Ankaŭ pri la preparataj ŝanĝoj li raportis.

Alia grava plano: «En la far BSO planita sistemo DLT, ne nur la interlingvo, sed ankaŭ la sciadbanko estos starigita surbaze de Esperanto.»

Jam estas konataj el diversaj Esperanto-revuoj la esploroj de la alia instituto — helpata ankaŭ de Komisiono de la Eŭropa Komunumo — Universitato Saarbrücken, kie ankaŭ oni uzas Esperanton kiel pontolingvon. Pri la novaj rezultoj de la esploroj raportis Heinz Dieter Maas (FRG), la gvidanto de la ĉi-rilata esplorgrupo. La Sarbrika Traduka Sistemo (Saarbrücker Übersetzung-System, «Susy») funkcias jam de 1972. Jam en la komenco de la esploroj evidentiĝis, ke la bezonojn de la Eŭropa Komunumo traduki el ĉiuj lingvoj al ĉiuj lingvoj kiuj estas uzataj, ne eblas, tial oni okupiĝis uzi Esperanton kiel pontolingvon.

Géza Gordos, docento de la Budapeŝta Politeknika Universitato prezentis la rezultojn de esploro pri lingvosendependa voĉosintezo, kaj altgrade aŭtomatigita tekstprepara sistemo, produktanta ties fundamentan vortostokon; ĝia uzado postulas nek lingvajn nek fonetikajn aŭ alispecajn antaŭkonojn. Ĉi tiu sistemo probable kontentigos ankoraŭ ne konatajn bezonojn de la rilatoj inter la homo kaj lia medio.

Hans Michael Maitzen, profesoro de la Instituto pri Astronomio de la Observatorio de Vieno krom la jam menciitaj temoj en sia prelego proponis esplorcelojn por fakuloj: «Perspektiva celo povus esti la apliko de kombinata strategio inter aŭtomata traduko en ajnan lingvon kaj aŭtomata parolsintezado tiulingva, tiel, ke la parolado en la Internacia Lingvo tuj poste aperus en unu aŭ pluraj naciaj lingvoj en parolata formo.»

La teknikajn aspektojn pri la aplikado de la komunikadrimedoj en diversaj terenoj pritraktas ankaŭ Ferenc Valter, vicdirektoro de la Hungara Poŝto, kiu prelegis pri «Teleinformadaj servoj» ĝenerale kaj precipe en Hungario; János Galambos, ĉefkunlaboranto de la Hungara Nacia Teknika Informada Centro kaj Biblioteko pri «Evoluigo de la tradiciaj kaj novaj metodoj de sciencteknika informado en Hungario ĉe HNTICB; György Westsik, docento de la Budapeŝta Politeknika Universitato pri «Estanteco kaj estonteco de la teleinformada servo de la trafiko»; Kerstin Kristofersson el Svedio pri la grupa komunikado per televido en Svedio; Ferenc Nagyszeghi, inĝeniero de la Budapeŝta Telefonfabriko pri «La planado de rilatoj inter homo kaj komputilo»; István Hegyi, hungara ĉefkuracisto de la Sanitara Fako de la Departementa Konsilantaro en Veszprém pri «Preparaj taskoj por aplikado de komputilo en la sanitaro»; Simeon Simeonov inĝeniero ĉe la Internacia Normiga Organizo en Svislando pri «Telekomunikaj informservoj en la teknika kaj ekonomia sferoj».

S-ro Hans-Dieter Maas el FRG

La dua grupo de prelegantoj analizis la diversajn sociajn rilatojn de la komunikado. Tamás Szecskő, direktoro de la Amaskomunikada Esplora Centro de Hungara Radio kaj Televido parolis pri la nova internacia informa kaj komunikada ordo. Li konstatis, ke la plej grava aksiomo de la nova internacia informa kaj komunika ordo estas la demokratio en la komunikado; «la demokratiigo de la komunikado povas signifi krean partoprenon de la individuo kaj la socio — laŭ la bezono kaj surbaze de egala eduka kaj kleriga eblecoj — en la procezoj de la produkto, decido, divido kaj konsumo de la socia komunikado«... «En la amaskomunikado dum la pasintaj jaroj, tiel aspektas, la komunikistoj, esploristoj kaj politikistoj eĉ ne turnis atenton kvalite al la lingvaj aspektoj.»

La prelego de Ervin Gömbös, ĝenerala sekretario de la Hungara UN-Societo, temis pri la demokratia divido de la informoj. Ervin Gömbös petis permeson alparoli duafoje kiel reprezentanto de la Monda Federacio de UN-Societoj. En sia alparolo li informis pri la enhavo de seminario organizita fare de la Monda Federacio de UN-Societoj, en Ĝenevo en oktobro 1981. La seminario rigardis kiel grava tasko la evoluigon de komunikada sistemo en la Tria Mondo, kaj samtempe akcentis ke la komuni-

kadaj problemoj ne estas apartigeblaj disde la aliaj ĉefaj demandoj de la moderna vivo, kiel la malarmado, la ĝenerala evoluo kaj la homaj rajtoj. Samtempe tiu seminario proponis laborplanon por la diversaj organizaĵoj de Unuiĝintaj Nacioj.

Werner Bormann el FRG eksplikis sian opinion pri la nova komunikada sistemo, ĝi «estas kompleksa teknologia aparato kun profundaj sociaj konsekvencoj, kaj ĝia establiĝo radikale ŝanĝos la kunvivadon», kaj li estas konvinkita, ke sur la kampo de lingva interkompreniĝo estas bezonata lingvo, uzata de homoj mem kaj rekte... La nova komunikada sistemo kune kun la Internacia Lingvo formas paron, kiu kune estas multoble pri progresiga por homaro, ol estas la du solaj.» Miklós Fehér el Hungario parolis «pri la disvastigo de tiu kultura valoro, kiun precipe la poezio de la plej diversaj popoloj prezentas.»

N.B. Zubkov de ASE el Sovetunio konigis la rolon de la gazetaro en la nuntempa Sovetunio, kaj donis detalan informon pri la esperantlingva gazetaro en sia lando.

Helmut Welger el FRG prelegis pri «Esperanto kaj komunika etiko.» Li konstatis: «la sukceso kaj efiko de nia agado senpere dependas de la konformeco al la komunikaj reguloj... Nia movado do pli konscie, pli senteble ol ĝis nun estu hejmo de ĉiuj komunikaj virtoj, kaj nia lingvo estu ilia simbolo.»

Stojan Ĝuĝev, bulgara profesoro en sia prelego okupiĝis pri «La lingvaj konfliktoj kaj diskriminacioj.» Li opiniis, ke la lingvaj konfliktoj «estas veraj, realaj konfliktoj, kiuj ofte degeneras en obstinajn luktojn aŭ verajn lingvajn militojn... La lingva diskriminacio manifestiĝas malsame en diversaj internaciaj kunvenoj kaj organizaĵoj.»

Helmar Frank, direktoro de la instituto pri Kibernetiko (FRG) elektis la jenan temon por sia prelego: «La rolo de ILo en la transportigo de lingvaj baroj de internacia komunikado.» Fine de sia interesa prelego li donis kelkajn sensaciajn informojn pri la fondota internacia universitato en San Marino, kies lingvo oficiala estos ankaŭ Esperanto.

La trian grupon de la prelegantoj konsistigis tiuj, kiuj okupiĝis pri la lingvaj aspektoj de la komunikado. M.I. Isajev, profesoro de Lingvoscienca Instituto de Soveta Akademio de Sciencoj en sia prelego trarigardis historie kaj laŭ la graveco ĉi tiun temon.

László Deme, doktoro de la lingvosciencoj prelegis pri «Estonteco de lingvoj — la lingvo de estonteco.» Li komparis la teoriojn de diversaj marksistaj filozofoj (J.V. Stalin, V.I. Lenin) kaj lingvistoj, poste li konkludis, ke la analizantoj de la lingvaj demandoj ĉiam alvenas al la ideo de komuna dua lingvo. Tiu lingvo ne estu iu nacia lingvo, aliflanke la marksisma filozofio ĝis nun ne havas prilaboritan koncepton pri la evoluo de la lingvoj; la marksisma filozofio ankaŭ ne refutis la ideon de «planitaj» lingvoj ĝenerale kaj precipe Esperanto. Post ĉi tiu analizo li okupiĝis pri la farendoj por disvolvigi Esperanton ene de la landoj kaj en internaciaj medioj. Li aldonis: antaŭ 13 jaroj el Budapeŝto eliris alvoko al la popoloj kaj registaroj de la mondo proponinta la preparon de konferenco pri sekureco de Eŭropo, kiu rezultigis konferencon en Helsinki. «Eble nia Universala Kongreso en ĉi tiu momento, 13 jarojn post la menciita alvoko povus koncepti novan alvokon: «Budapeŝtan proponon» por pograde venki la malavantaĝojn de la multlingveco.»

S-ro Hans-Michael Maitzen el Aŭstrio



Bruce Arne Sherwood, usona profesoro en Universitato de Illinois en Urbana-Champaigu, parolis pri la «Klasifiko de lingvaj problemoj en internaciaj konferencoj.» Li trapensis pri lingvajn problemojn de prelego, demand-serio, konversacio, laborgrupoj, kaj fine li konstatis la lingvan diskriminacion de internaciaj konferencoj. «Rego de oficiala konferenca lingvo povas esti pli grava ol fakaj scioj... Kiuj denaske regas la oficialan lingvoj tiuj regas la konferencon,... nur ili faras demandojn kaj lerte eksponas siajn vidpunktojn.» Ĉi tiu situacio estas malavantaĝa por ĉiuj partoprenantoj.

Gianfranco Polerani el Milano (Italio) en sia prelego parolis pri «La lingvaj baroj kaj la sporto.» Li citis la intervjuon faritan de ĵurnalistoj de la hungara sindikata tagĵurnalo «Népszava», en kiu respondis la demandojn olimpikaj kaj mondĉampionoj. La respondoj firmigas la esperantistojn en tiu konscio, ke ankaŭ multaj sportistoj suferas pro la lingvaj problemoj.

Ernő Csiszár, mezlerneja instruisto aldonante proprajn spertojn, parolis pri «La rolo de familio en la lingvoalproprigo». Li alvokis pli efike ekuzi la kapablon de infanoj antaŭ la enlernejiĝo por instrui Esperanton, kiu ankaŭ helpas la pli postan perfektiĝon en la Internacia Lingvo, la lernadon de aliaj lingvoj, kaj ĉefe povas krei la staton de dulingveco.

L. Laannest el Sovetunio faris multajn interesajn konkludojn komparante la lingvouzon de virinoj kaj viroj.

Resume ni povas konstati, ke la konferenco estis sukcesa, donis eblecon por la fakuloj interŝanĝi opiniojn kaj spertojn; la publiko konatiĝis iomete pli detale kun la komunikadaj aspektoj, sed la plej grava rezulto estas tio, ke ni trovis novan eblecon propagandi Esperanton sur nova tereno.

Oszkár *Princz*

Por la efika instruado

2-a Tago de la Lernejo en la 68a UK en Budapeŝto

Daŭrigante la laboron komencitan en Antverpeno (1982), en Budapeŝto okazis la duan fojon la Tago de la Lernejo dum la UK (ĵaŭde). La programon honoris reprezentantoj de hungaraj ŝtataj kleriginstancoj, nome la ĉefdirektoro kaj la estro de la fremdlingva sekcio de la Nacia Pedagogia Instituto, reprezentanto de la Ministerio pri Klerigo, estro de la kleriga sekcio de la Ĉefurba Konsilio, la direktoro de la Ĉefurba Pedagogia Instituto kaj sekciestro de Landa Sindikato de Pedagogoj.

La ĉefdirektoro de Nacia Pedagogia Instituto, akademiano d-ro Miklós *Szabolcsi* salutis la kunvenon kaj informis la partoprenantojn pri tio, kiun lokon nun okupas la Esperanto-instruado en la oficiala ŝtata instrusistemo, kaj kian perspektivon ĝi havas. Li akcentis, ke la E-kulturo estas integra parto de la ĝenerala kulturo, kaj la edukado je Esperanto harmonias al la celoj de la hungara edukpolitiko.

D-ro Gyula *Mezei,* estro de la kleriga sekcio de la Ĉefurba Konsilio alte taksis en sia konciza parolado la lingvoekzercigajn internaciajn tendarojn por gelernantoj de diversaj aĝgrupoj, kaj denombris tiujn, kiuj lastatempe regule okazadas en Hungario.

Post la salutvortoj de la menciitaj du altrangaj gastoj, s-ro Baldur *Ragnarsson* (IS) malfermis la Tagon per sia enhavriĉa prelego pri la kadrotemo «E-instruado kiel kontribuo al interkultura informado.» El la prelego mi citas unu, sed ŝajne la plej gravan ideon: por ke la E-instruado povu plenumi interkulturan informadon, estas bezonate, ke ni havu modernan «tridimensian» lernolibron. La tri dimensioj estas la jenaj: 1/ konoj pri la lingva sistemo de E-o; 2/ prezentitaj cirkonstancoj por apliki la lingvon; 3/ edukado de la kultura fono de la lingvo. «Ni povas kaj devas pli celeme enkonduki en niajn lernolibrojn de Esperanto temojn de aŭtentika, internacia edukvaloro» — tiel resumiĝis en la prelego tiu ĉi ideo.

Prof. d-ro István *Szerdahelyi* (H) eĉ pli konkrete parolis pri la socia-kultura fono de Esperanto, pri tiu instrumaterialo, kiun en naciaj lingvoj oni nomas «Landeskunde», «Language and area», «Langue et civilisation», «stranovedjenije» k.s. Li denombris la konojn pri la itala kulturo, kiujn devas ellerni gelernantoj studante la italan en hungaraj gimnazioj. La E-lernolibroj de d-ro Szerdahelyi por gimnazianoj (16-18-jaruloj) enhavas informojn pri

internacia junulara movado,
modernaj olimpikaj ludoj,
internaciaj signosistemoj de trafiko,
flugado, kosmonavigado (K.E. Ciolkovskij),
Semmelweis,
Ruĝa Kruco (H. Dunant),
Ĉu la homaro havis komunan pralingvon? Deĉifro de malnovaj lingvoj (Champolion, Grotefend),
la latina kiel internacia lingvo,
internaciaj organizaĵoj (Monda Packonsilio, UN, UNESKO, UEA),
internaciaj pacpremioj Lenin kaj Nobel,
interlingvistiko: hungaraj planlingvo-projektoj; ekesto kaj disvastiĝo de E-o; E-aj literaturo kaj movado.

La denombritaj konoj ne estas iu plusa ĉapitro en la lernolibro, sed ili konsistigas la lecionojn de la dua lernolibro por gimnazianoj, tiel la lernolibro korespondas ankaŭ al tiu didaktika postulo, ke la legaĵoj ne

D-ro Gyula Mezei, estro de la kleriga sekcio de la Ĉefurba Konsilio salutas la kunvenon

Malantaŭ la prezida tablo sur la muro pendas la kritikitaj ilustraĵoj por gramatiko



La provleciono de F. Simonnet

estu pure ilustraĵoj por la gramatiko, sed ili havu informvaloron.

La vicon de prelegoj daŭrigis s-ro Yosimi Umeda, (J) kiu parolis pri «Instruado de Esperanto al internacia lernantaro en la San Franciska Ŝtatuniversitato en Usono», krome — kiel kompetentulo pri komunikado — tre interesajn indikojn li diskonigis pri la enfluantaj informaĵoj en Japanion.

Zsuzsa *Barcsay* (H) informis la ĉeestantaron pri la 1-a Metodika Seminario de UEA, okazinta en la antaŭkongresa semajno en hungara urbeto Gyula.

Sekvis du modellecionoj.

Tiu de Jozefo *Horváth* (H) impresis la aŭskultantaron per sia prepariteco: aro da transparentoj kaj manipuleblaj objektoj ilustris la instruatan materialon. La kursanoj havas pseŭdonimon dum la daŭro de la kurso por liberigi ilin de eventualaj inhiboj. Multaj ja interesiĝis ĉe la instruisto, ĉu transparentoj kun gramatikaj tabeloj ktp. estas aĉeteblaj. S-ro Alfonz *Pechan,* estro (jam de pli ol 40 jaroj!) de la Ekzamena Komisiono de HEA asertis, ke dum mallongaj rapidkursoj oni ja povas akiri sufiĉe da lingvaj konoj, tamen estas bezonate poste diligente daŭrigi la lingvolernadon kaj apliki la lingvon por maturigi la sciojn. Aliaj partoprenantoj de la Tago turnis sin al la organizantoj: kiel eblas, ke en Hungario *adulto* estas afiŝita «instrumaterialo» por ilustri gramatikon.

Kelkaj okcidentanoj eksplikis, ke laŭ ilia moro en publikaj (lingvo-) kursoj oni evitas paroli pri religio, politiko kaj sekso por respekti individuajn opiniojn pri tiuj temoj; kelkaj el socialismaj landoj demandis, kiel tiuj afiŝoj kaj la agresema korusa ripetigado de (nacilingva) teksto en E-kurso harmonias al la spirito de edukado en nia socio.

La organizanto de la Tago — ankaŭ kiel gvidanto de la Instrua Komisiono de HEA — devas deklari, ke la partio kaj registaro en Hungario havas tute aliajn edukcelojn: en la lernejoj ni klopodas prepari la gelernantojn por harmonia familia vivo. Nia socio kaj registaro ĝismaksimume protektas la familiojn kaj kondamnas tiujn, kiuj ne plenumas sian devon al sia familio aŭ misuzas la liberecon, kiun la moderna socio ebligas al ĉiuj civitanoj; krome nia pedagogio estas libera de agresemo.

Do la prezentita metodo estas iniciato de privatuloj, fakte *pirata* metodo, kiel ili mem trafe nomas ĝin.

La modelleciono de Francisko *Simonnet* (F) prilumis gravan metodon, kiun oni traktas kutime nur marĝene, nome instruadon de kantoj. Pli precize: «Instruado per kanto al lernantaro neegalnivela» (precipe dum kelktagaj aranĝoj, kiam oni devas «denulajn komencantojn» kaj preskaŭ flue parolantojn samtempe kaj maltede progresigi»). La instruisto elektu kanton kun ofta ripetado kaj ripetendajn vortojn kun malalta frekvenco. La oftajn vortojn la lernantoj ja ĉiukaze konas aŭ nepre lernos poste, sed ankaŭ la maloftajn ili alprogrigas ripetante ilin en ĉiu strofo. La teksto kaj melodio estu simplaj. La kursanoj-kantantoj formu cirklon, tio estas psika postulo. La instruisto devas laŭte, distinge paroli, ĝuste gestikuli, bonritme kaj gaje kanti.

Zsuzsa Barcsay, gvidanto de la Instrua Komisiono de HEA, la ĉefa organizanto de la Tago de la Lernejo

Aparte interesa programo sekvis poste: prezento de infanoj, denaske edukitaj je Esperanto en la familio. S-ino Barbara *Pochanke* (PL), patrino de tri gefiloj (ĉiuj partoprenintaj la IK-on) parolis pri siaj spertoj rilate al dulingveco en familio, etne unueca. Poste kelkaj geknaboj atendis kaj respondis demandojn de la kongresanoj. Ilia lingva instinkto, spontanea kaj lingve korekta parolo ne nur ravis la ĉeestantojn, sed espereble ankaŭ instigis ilin je E-lingva edukado de siaj infan-familianoj.

Dum la Publika Diskuto, gvidata de s-ino Irena *Szanser* (PL) manifestiĝis tre diversaj opinioj pri la enhavo de E-instruado (ĉu intensaj rapidkursoj, ĉu edukado inkl. kulturan fonon estu preferataj; ĉu verki internacian lernolibron por komencantoj aŭ antaŭvidi transferojn kaj interferojn inter Esperanto kaj diversaj etnaj lingvoj; kiel reciproke rekoni E-ekzamenon en diversaj landoj, ĉu unuecigi postularon kaj nivelojn ktp.

Novaj instruhelpiloj estis prezentitaj: bildserio kun broŝuro de Eva *Benická* (ĈS) kaj lingvodomeno de Katalin *Zimonyi* (H). Esprimiĝis ankaŭ intereso aperigi la materialon de la 2-a Tago de la Lernejo libroforme, kiel aperis ankaŭ la prelegoj kaj lecionoj de la 1-a Tago en la volumo *Metodiko en la Praktiko* (Paderborn resp. Budapeŝto).

Fine Baldur *Ragnarsson* resumis la spertojn, konkludojn de la Tago, konstatante, ke tiun tradicion oni devas daŭrigi, ankaŭ en Vankuvero okazigi Tagon laŭeble kunlabore kun ILEI.

La taskon de sekretario/protokolanto plenumis Marin *Bacev* (BG), la Tagon prezidis alterne la organizantoj:

Zsuzsa *Barcsay* kaj Hermann *Behrmann*

Pri la teatraj programoj

Tamen amuza

Tiu ĉi teatraĵo estis ludita jam la okan fojon sur Esperanto-scenejo. Unuafoje ĝi prezentiĝis dum la Budapeŝta Printempa Festivalo en 1982. Oni ludis ĝin ankaŭ dum la 67a UK en Belgio. Multaj esperantistoj jam spektis ĝin antaŭ la 68a UK en Budapeŝto, kaj la opinioj pri ĝi estis kontraŭdiraj; al iuj ĝi ekplaĉis — aliaj kritikis ne nur la teatraĵon, sed ankaŭ ĝian surscenigon. Verŝajne tial dum la ĉijara Kongreso, la intereso de la publiko al *«Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l' Profeto?»* estis grandioza. Oni prezentis la teatraĵon la 4-an de aŭgusto en la Kongresejo, Salono Zamenhof, antaŭ 3000 spektantoj.

La teatraĵo, kies aŭtoro estas János Elem, verkiĝis en la hungara lingvo, tamen ĝia temo estas vere Esperanta. Fantazia turisma entrepreno organizas ekskurson al dezerto. Oni lasas la partoprenantojn de la ekskurso por du semajnoj en la dezerto, kaj donas al ili plenan liberecon. Ili rajtas fari tie kion ajn. El tiu ĉi situacio kreiĝas konfliktoj kaj komikaj situacioj. Por surscenigi tiun ĉi teatraĵon, la reĝisoro László Romhányi elektis la tradician teatran formon. Lia celo estis montri la konduton de diversaj homaj tipoj en eksterordinara situacio, kaj ĝuste pro tio li emfazis la plej karakterajn trajtojn de la rolantoj, kiuj trajtoj estis hiperbolitaj preskaŭ ĝis simbola signifo. Ekzemple la sola celo de la reĝema direktoro Ernestro estas la negoco. Li pretas eĉ en la dezerto entrepreni negocojn. Tiun ĉi rolon majstre kaj talente interpretis la konata aktoro Kálmán Szabó. La rolon de Roberto, la turisma teoriulo, kiu emas al filozofiado, eminente ludis Roberto Bánky, kiun la Esperanto-publiko jam bone konas per la multaj Esperantaj pupteatraj spektakloj. Józsa Hacser, en la rolo de Mova, estis la moviĝema, grumblanta edzino, veninta kun la edzo fari la «adiaŭ-nuptovojaĝon».

Impresis la ludado de Denise Kárpáti, en la rolo de Kristina — la naiva juna instruistino. Eminente ludis Ildikó Pécsi en la rolo de Ina, Csilla Herceg en la rolo de Jeva, István Wohlmuth en la rolo de Adamo kaj la ĉarma juna aktorino Zsuzsa Szilágyi en la rolo de la papaga ĉiĉeronino, kiu ne komprenas, nur parolas la lingvon de la turistoj. (En la pli fruaj prezentadoj tiun rolon ludis viro.) Kiam ni analizas la ludadon de la geaktoroj, ni nepre devas mencii ankaŭ la nomon de la plej juna aktoro, la knabo Rikardo Horváth, kiu per sia vivĝoja ludado ravis la publikon. Sed la brila aktora ludado, la bona Esperanto-prononco de la teksto ne povis kompensi kelkajn dramaturgiajn mankojn de la teatraĵo. «Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l' Profeto?» eble ne estis la plej elstara spektaklo dum la ĉijara Kongreso, tamen ĝi amuzis 3000 homojn dum du horoj. Cetere, ĝis nun vidis tiun ĉi teatraĵon ĉ. 7-8000 esperantistoj.

Pupteatraĵo — donace

La kvaran teatran tagon, ĵaŭde, je la 14-a horo komenciĝis la ne antaŭanoncita, kvazaŭ donace ricevita pupteatra prezentado: *«Johano la brava»*. Kvankam tiu ĉi frua posttagmeza komenco estas favora nek por la geaktoroj, nek por publiko — tamen la spektaklon atendis plen-plena salono. Plejparto de spektantoj estis la plej junaj kongresanoj, t.e. reprezentantoj



3000 kongresanoj spektis la „Profeton..."

El „Johano la Brava"

La rolantoj de „Kiun ajn nomon vi havas" post la prezentado

de «Kongreseto», sed la prezentado gajnis la plaĉon ankaŭ ĉe plenkreskulaj spektantoj, kaj tio ne estis hazardo.

La fundamenta verko: la versa popolfabelo de Petőfi ja estas jam tutmonde konata, krom du apartaj eldonaĵoj ĝi aperis ankaŭ en «Libero kaj amo» — en poemaro redaktita kaj tradukita far Kalocsay.

La saman spektaklon Hungara Ŝtata Pupteatro jam prezentis diversloke kaj en diversaj lingvoj. La esperantlingva prezentado dankeblas al s-ro Roberto Bánky, kiu ekde la 51a UK multe kontribuis al disvastigo de la Internacia Lingvo dum internaciaj pupteatraj festivaloj; li estis ankaŭ la tradukinto, utiliginte tradukon de Kalocsay. La versan fabelon de Petőfi adaptis por pupteatro s-ro Dezső Szikágyi, direktoro de la Hungara Ŝtata Pupteatro. La sama prezentado en la Zagreba Pupteatra Internacia Festivalo gajnis eĉ kvin diversajn premiojn. Kaj ĉi-foje — la plej grandan riceveblan premion: longdaŭran aplaŭdadon de la dankema publiko.

La muziko de Bála András, pupoj de Vera Bródy, dekoracioj de István Koós kaj reĝisorado far Gyula Urbán same kontribuis al la sukceso, kiel la ludo de la pupojn movantaj kaj paroligantaj geaktoroj.

Utili — kiun ajn nomon vi havas

«Mi volis nur utili kaj ne brili» — estis la titolo de la planita Petőfi-recitalo de Gabi Jobba. Tamen, pro la abrupta malsaniĝo de la aktorino la prezentado ne okazis.

Kaj venis Studio «P» el Torun, kies entuziasmaj amatoroj savis la situacion: ili anoncis sin kaj sian programon anstataŭ la neokazinta recitalo. Ili volis nur utili, sed ili ankaŭ brilis. Ilia programo, titolita *«Kiun ajn nomon vi havas»*, rakontis pri la mezepoka heroino Joana d'Arc, kaj samtempe pri la eterna problemo de la individua libereco — problemo tiom aktuala en nia epoko. Fonto de la teatra prezentado estis verko de Andrzej Wydrzynski, la tekston tradukis s-ino Teresa Nemere, la laboron de la trupo gvidis la reĝisorino: Lucyna Sovinska.

Studio «P» fondiĝis en 1972, iliaj pollingvaj prezentadoj plurfoje estis premiitaj. Ili debutis jam antaŭ esperantista publiko en Pollando, dum la Tutlanda Trarigardo de Esperantista Artagado per «Risorto» de Stefan Mrowinsky.

La nuna, malpli ol duonhoron daŭranta spektaklo okazis en kamera salono, la geaktoroj ludis inter la publiko. Krom kvarangule flamantaj kandeloj ili havis nenian rekviziton, nek kostumojn, tamen eĉ sen tiuj ili sukcese peris la ideon, kaj donis artan travivaĵon.

La spektaklon sekvis vigla diskuto, dum kiu la trupanoj respondis al la demandoj de la publiko.

Pri la homaj rilatoj — lirike

Ankaŭ la bulgarajn geaktorojn Belka Beleva kaj Anani Anev ni ne bezonas jam prezenti al la Esperanta publiko. Ili partoprenis en la kulturaj programoj de pluraj Universalaj Kongresoj kaj en diversaj Esperanto-aranĝoj. Eble la Esperanto-publiko ankoraŭ memoras la teatraĵojn, en kiuj ili ludis kiel ekzemple «Edziĝpropono» de A.P. Ĉehov, «Divorco» de N. Slonova, «La Rozoj» de Aldo de Benedetti kaj multaj aliaj.

Dum la 68a UK en Budapeŝto, Beleva kaj Anev prezentis sin en nova teatraĵo — la lirika dramo «Malnovmoda komedio» de A. Arbuzov.

Arbuzov estas unu el la plej talentaj nuntempaj sovetaj verkistoj. Li apartenas al tiutipaj aŭtoroj kiuj spertas trovi dramajn konfliktojn eĉ en la plej ordinaraj momentoj de la ĉiutaga vivo. La ekstera agado en liaj dramoj ofte estas simpla kaj ordinara, ekzemple en «Malnovmoda komedio»

Sceno el „Malnovmoda komedio"

renkontiĝas du personoj, jam tute ne junaj, Rodion Nikolaeviĉ — ĉefdoktoro de marborda sanatorio kaj Lidia Vasilevna, flegatino en la sama sanatorio. Ilia hazarda renkontiĝo povus esti nur momenta, sed io profunda ligas tiujn ĉi du personojn, kaj malgraŭ malfrue, ili renkontiĝas por resti kune.

La reĝisoro Nikola Petkov strebis montri la homecon, kiu radias el tiu ĉi lirika dramo. Li delikate emfazis la komikajn situaciojn en la verko kaj tiamaniere la prezentado sonis ne sentimentale, sed vigle kaj humore.

La geaktoroj bone ludis provante plene realigi la koncepton de la reĝisoro. Per longa aplaŭdo la publiko dankis pro la bela spektaklo.

Ni vivos... des pli *

Julian Modest: Ni vivos. Prezento en «Pataky István» Kulturcentro — Budapeŝt, far la grupo «Garabonciás» el Kecskemét. Reĝisoris János Beregszászi; rolis: M. Fekete, C. Gudricza, J. Beregszászi, M. Pásztor, F. Samu, K. Abonyi, A. Tóth, J. Nagy, M. Molnár; dekoracio kaj kostumoj de Iván Szkok.

Mi vidis la spektaklon dufoje: en Debrecen kaj en Budapeŝt. La impresoj konfirmiĝis. Tia prezento postulas ŝlosilon, la interpretilon, sen kiu la imagon minacas vaga deflankiĝo. Do, kelkfraze. En nuntempa teatro hejmiĝis jam la fama koncepto kaj laborskolo de Jerzy Grotowski, laŭ kiu aktoro pli proponas ol respondas, pli nur skizas ol reliefigas, lasante al la spektanto mem finbildigon de apartaj scenoj. Tiucele la aktoroj rezignas pri ĉi-epokaj uniformoj kaj simboloj; la dekoracioj apenaŭ ekzistas, permesante esprimiĝi al la korpo mem, eĉ al la vortoj lasante duagradan rolon. La aktoroj laboregas kaj en sukcesa koincido vekas kaj riĉigas la aran imagon de la spektantaro.

Ĉi-spektakle en la fono ni vidis blankon kaj nigron. La korpadheraj kostumoj estis ankaŭ nigraj aŭ blankaj. Se iu akceptis la proponon de J. Beregszászi kaj I. Szkok, li aŭ ŝi devus tuj rimarki, ke la plej blanka estis Lidia Zamenhof — la heroino de la dramo. Mi dirus — de la tragedio, en kiu densiĝis teruro.

Almenaŭ tiuj el ni, kiuj ankoraŭ memoras ekstermadon laŭ faŝisma metodo, povis facile imagdesegni SS-ecan ĉapon sur la kapo de János Nagy, kiu per muskoloj kreis la eksterman etoson. Mi angoris kun la povraj zamenhofanoj. Certe mi angorus (aŭ alikaze nur komprenus) pli profunde, se la teknika flanko de surbendigo estus pli bona. Sendube ankaŭ plivalorigus la spektaklon pli klara prononcado de la Internacia Lingvo, kion faris sufiĉe nur Mária Fekete kaj Kata Abonyi kaj kies manko probable plej forte seniluziigis la spektantaron.

Tamen tiuj el ni, kiuj kutimas uzi sian imagon, ricevis fortajn impulsojn por ankoraŭfoje travivi la tragedion de judoj, kondensiĝintan en la sorto de la Zamenhof-familio. Julian Modest en sia unua scenverko sukcesis memorigi kaj vigligi tiun efektive esperantistan medion, ĉerpante el la plej aŭtenta fonto, el kiu — laŭ mi — devus ĉerpi E-verkistoj. Ne ekzistas pli signifa argumentaro por konfirmi nian ekziston ol tiu, kiu devenas de nia ekzisto. La debuton mi konsideras grava kaj sukcesa, kvankam povas okazi, ke alia reĝisoro utiligos alimaniere la enhavon de la verko. Sed li havos efektive malfacilan taskon post la plej universalisma propono, kian ni povis gustumi en Hungarujo.

Atentigis min aparte la profundaj psikologiaj observoj de la aŭtoro, kiu — kvankam dokumentare — rajtus ja misrimarki iun vivo-veron. Tiu esprimplena forta akuzo — kontraŭ Lidia, kontraŭ Esperanto, kontraŭ iu ajn, kiam esti esperantisto egalis kun danĝero. Skuis min la kriegoj de Janina. Tiajn akuzojn spertis ja miloj da esperantistoj en diversaj lokoj kaj tempoj.

«*Kial ni ne povas vekiĝi en tia mondo, kie ne estas malsato, pafoj, murdoj...*» Jen la eterna revo de la homo, kiu uzas eĉ apartan lingvon

Belka Beleva kaj Anani Anev en „Malnovmoda komedio"

Interesa lumefekto en „Ni vivos!"

Sceno el „Ni vivos!"

por interkompreniĝi. En la buŝo de Lidia Zamenhof ĝi ekhavas simbolan signifon, ĉar ŝi esprimis ĝin renkonte al la morto. Ŝi, kiu sian vivon identigis kun la bela koncepto de sia patro. La fino evidentiĝis tragedia. Sed kiomfoje ankaŭ poste! Ĉiu nuntempulo povus facile listigi tiujn, kiuj mortis kun la sama profunda fido: ni vivos! Sed dank' al la viktimoj ni vivas des pli, ĉar ŝajne ies ofero permesas al ni mem pli konscii la esencon de nia vivo. Julian Modest. Jen la nomo, kiu signifos malmodeste en E-literaturo.

* Tiun ĉi recenzon verkis Tyburcjusz Tyblewski

Intimeco kaj naiveco

Ildikó Pécsi estas unu el la plej konataj hungaraj aktorinoj. Oni ofte povas vidi ŝin en hungaraj filmoj, en televidaj programoj, en spektakloj de la teatro «Radnóti», kie ŝi konstante ludas.

Antaŭ jaro kaj duono, dum la Budapeŝta Printempa Festivalo, Ildikó Pécsi debutis sur la Esperanta scenejo en la teatraĵo «Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l' Profeto?» Tiu ĉi fakto iĝis decida en ŝia teatra kariero. Ildikó Pécsi deklaris, ke emocie ŝi estas «centprocente esperantisto» kaj tuj ŝi akceptis rolojn en aliaj Esperanto-spektakloj, kiel ekzemple: «La aŭroroj ĉi tie estas silentaj» de B. Vasiljev kaj en «La mortintoj de Spoon River» de E. L. Masters.

Kiel aktorino, kiu konstante kaj senlace serĉas vojon al la publiko, Ildikó Pécsi decidis prezenti, speciale por la Esperanta publiko, solprogramon, kaj tiun ĉi literaturan-muzikan programon ŝi titolis «*Leteroj*», titolo ne hazarda, ĉar la leteroj ligas la esperantistojn al la tuta mondo. La leteroj plej sincere rakontas pri niaj ĝojoj kaj doloroj, pri niaj amoj kaj seniluziiĝoj. Verŝajne ne estas homo, kiu dum sia tuta vivo ne skribis leteron, leteron al sia patrino, leteron al sia amikino, al sia kara parenco... Por sia solprogramo Ildikó Pécsi elektis popularajn kantojn, belajn poemojn, interesajn prozerojn. La tradukojn faris la konataj hungaraj tradukistoj I. Szabó, V. Benczik, P.A. Rados kaj J. Horváth.

Unuan fojon Ildikó Pécsi prezentis tiun ĉi programon dum la ĉijara Budapeŝta Printempa Festivalo, kaj oni invitis ŝin prezenti la saman programon ankaŭ dum la 68a UK en Budapeŝto.

Ĉiuj, kiuj bone konas la teatran arton, scias, ke la prezentado de solprogramo estas malfacila tasko. La sukceso de simila spektaklo dependas ne nur de la talento de la aktoro kaj de la bona elekto de la literatura teksto, sed ankaŭ de la reĝisorado, de la muziko, kaj de diversaj aliaj faktoroj, kiujn oni ofte ne povas eĉ antaŭvidi.

Nun ni povas konstati, ke Ildikó Pécsi bone kompilis sian sepdekminutan literaturan-muzikan programon, sed eble estus pli bone, se la programo estus reĝisorita de reĝisoro kaj ne de la aktorino mem, ĉar tiam eble la prezentado povus esti pli varia, pli kolora, pli atentokapta.

Verŝajne por kontentigo de pli vasta publiko, en la programo de Ildikó Pécsi apudis seriozaj kaj mezvaloraj literaturaj verkoj, kiuj tamen, kiel tuto, donis al la spektaklo iun apartan naivecon kaj gajecon.

La muziko de la spektaklo estis bone elektita kaj pro tio oni devis danki ankaŭ al István Gyarmati, kiu fortepiane akompanis la programon.

Sendube Ildikó Pécsi posedas rimarkindan talenton, sed tio ne ĉiam povas garantii la sukceson de Esperantlingva spektaklo. La aktorino devas iom pli delate studi la Internacian Lingvon, por ke ŝiaj prezentadoj estu pli allogaj. Sed malgraŭ la rimarkoj, la spektaklo kiu okazis la 5-an de aŭgusto en kulturcentro «Pataky», estis bone akceptita de la Esperanto-publiko.

Konklude

La Esperantaj teatraj prezentadoj dum la 68a UK en Budapeŝto estis grandioza manifestiĝo de la Esperanta teatra arto. Tiuj ĉi spektakloj elokvente pruvis, ke Esperanto-teatro vivas kaj evoluas, ke tiu ĉi teatro enhave kaj forme estas vere internacia.

Analizante la teatrajn spektaklojn, ni konstatis, ke en la nuntempaj Esperanto-teatroj videblas kelkaj interesaj tendencoj. La pli multaj el la teatraj trupoj flegas la tradician teatron, teatro kiu havas siajn pozitivajn, sed ankaŭ negativajn flankojn. Tamen ni vidis ankaŭ spektaklojn, kiuj respegulis la tendencojn de la eksperimenta, avangarda teatro, kaj ne hazarde la prezentado de «Ni vivos!» estis unu el la plej interesaj kaj diskutataj.

Estas salutinde, ke la reĝisoroj elektis verkojn de mondfamaj dramverkistoj, kiel Shakespeare, Beckett, Sartre k.a., sed ne ĉiuj el la reĝisoroj sukcesis profunde kaj majstre interpreti tiujn ĉi klasikajn verkojn.

La programo estis ege varia. Ni vidis monodramojn, klasikan komedion, misteran ludon, muzikan pupteatraĵon, originalan dokumentan dramon, tamen la originalaj Esperanto-verkoj estis nur du: «Zamenhof» de J. Gibczynska kaj «Ni vivos!» de Julian Modest, kaj eble tial la intereso de la Esperanto-publiko al tiuj ĉi du spektakloj estis aparte granda.

La teatra programo de la 68a UK havis mirindan sukceson, ni povus mediti ankaŭ pri la stilo de la aktora ludado, pri la lingva nivelo, sed ni lasu tiujn problemojn al la estontaj kronikistoj de la Esperanto-teatro.

B.G. *Sipkov*

Ildikó Pécsi fine de sia spektaklo



Nacilingva informado pri la 68a UK

La 68a Universala Kongreso rikoltis abundan eĥon en la hungaraj amaskomunikiloj. Inter la komenco de junio kaj la fino de septembro en la hungara gazetaro aperis minimume 496 publikaĵoj pri Esperanto aŭ pri la UK mem. El tiuj 5 artikoloj tuŝis principajn aspektojn de la rolo de Esperanto en la internacia komunikado, 51 artikoloj lige kun iu evento analizis la valorojn de Esperanto, aperis 21 intervjuoj kun elstaraj esperantistoj, 28 raportaĵoj pri diversaj kampoj de la esperantista movada agado, 69 raportaĵoj pri konkretaj — ĉefe kongresaj — eventoj, 107 artikoletoj pri eventoj ktp., kaj 215 mallongaj informoj.

Post la tago de la Inaŭguro ĉiuj tutlandaj tagĵurnaloj aperigis raportaĵojn — plej ofte kun foto — sur la frontpaĝo. Pri tiu ĉi plej impona evento de la UK dissendis filmraportaĵon la unua kanalo de la hungara televido la 31-an de julio (dimanĉe) vespere je la 20-a horo: tiam rigardas la televidon ĉ. 6 milionoj da personoj. La raportaĵo plenigis ĉ. la trionon de 10-minuta taga resumo pri la plej gravaj eventoj enlandaj kaj eksterlandaj. Krom tio estis dissenditaj minimume kvarfoje filmraportaĵoj pri la UK en la hungara televido.

La hungara novaĵagentejo MTI 19-foje raportis dum la UK pri diversaj eventoj: tiujn raportojn ricevis ĉiuj enlandaj kaj eksterlandaj abonantoj de MTI.

La hungara radio — krom la oftaj mencioj en la regulaj novaĵprogramoj — en almenaŭ kvar programoj okupiĝis pri Esperanto kaj la UK dum la kongresa semajno.

Oni povas diri, ke la kongresa gazetara servo funkciis bone, kaj ĝi prezentis la 68-an Universalan Kongreson de Esperanto al la publiko en inda formo kaj taŭge vastaj dimensioj. La bela rezulto estas la frukto de kolektiva laboro de multaj hungaraj ĵurnalistoj, simpatiantaj al la ideo de la Internacia Lingvo: tiun kolektivan laboron organizis la du kunlaborantoj de LKK pri la nacilingva gazetaro — Erzsébet Jenőváriné—Kiss kaj Imre Szenes.

Alveninte el Vjetnamio...

Buntaj vestaĵoj, mildaj, ridetemaj vizaĝoj — du junulinoj el la pli ol kvinmil partoprenantoj de la 68a Universala Kongreso de Esperanto.

Fraŭlino NGUYEN Kim Hà kaj ŝia fratino, Thi Trĩ alvenis el Vjetnamio, el la urbo Ho Ŝi Minh. Ili mem rakontas, kiel ili venis al ĉi tiu kongreso:

— Laŭ la originala plano ni intencis viziti niajn parencojn, vivantajn en Eŭropo. La lastan semajnon de julio ni alvenis en Parizo, tie unu el niaj francaj amikoj kuraĝigis nin veturi en Budapeŝton. Hungario estas la unua fremdlando, kie ni pasigis tiel longan tempon, pli ol du semajnojn.

— Ni tre ĝojas, ke ni povas partopreni ĉi tiun kongreson — ekparolas la pli juna fratino —, jam hejme ni forte interesiĝis pri la Esperanto-movado. Bedaŭrinde por lerni la lingvon ni ne havis sufiĉe da tempo, ni nun partoprenis la lingvokurson dum la kongreso.

— Estas mirinde, ke la ĉeestantoj uzas lingvon, kiu vere kunligas ilin; anglo, svedo, polo kaj franco kapablas ĝin paroli samfacile. Ĉi tie ĉiuj interparoloj servas fakte la pacon, ja mem la lingvo, kiu pretendas la subigon de neniu alia lingvo, respegulas la estimon al aliaj personoj.

Nur pro la deviga reciproka respekto la fratinoj ne interrompas la parolon unu de la alia, tiom entuziasme ili eldiras tiujn jam multfoje uzitajn vortojn, kiuj nun venas el la profundo de ilia animo.

La lingvo Esperanto krom ĝia «interna ideo» interesas ilin ankaŭ pro praktikaj kialoj.

— Ni ne estas lingvistoj, la pristudo de la strukturo de Esperanto ne tiom allogas nin. Sed en nia profesio povus multe helpi al ni iu vaste parolata lingvo. Ni okupiĝas pri la akupunktura metodo, kaj volonte ni konsultiĝus kun la fakuloj de diversaj landoj.

— Lige kun tio, estis por ni ege interese partopreni la kunvenon de Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio — aldonas Hà. — Ankaŭ ni estas vegetaranoj, pro sannutradaj, religiaj kaj humanecaj kaŭzoj.

Kiajn impresojn ili ricevis pri Hungario? Mi ne bezonas demandi ilin pri tio, ili ambaŭ entuziasme laŭdas la gastamon de hungaroj.

Hà kaj Trĩ restis ankoraŭ kelkajn tagojn en Hungario post la kongreso, ilin invitis freŝkonata hungara familio por viziti kelkajn regionojn de la lando. Post unu horo ili ekveturos, ni devas rapidi. Ankoraŭ kelkajn vortojn pri la situacio de Esperanto en Vjetnamio.

— En la urbo Ho Ŝi Minh oni povas lerni Esperanton en privataj kursoj, sed en Hanojo ĝi estas instruata oficiale por dekjaruloj en ŝtata lernejo.

En la lastaj minutoj ili ankoraŭ akceptas trovi peranton por la gazeto de komputistoj. Vjetnamio estos la dudek sesa lando, kie oni legas ĉi tiun revuon.

Post rapida adiaŭo la du vjetnamaj fraŭlinoj haste foriras — atendas ilin la ĝis nun nekonataj regionoj de Hungario kaj Eŭropo.

Márta *Kovács*



Departemento Bács-Kiskun

Geografie la departemento situas sur la suda parto de la teritorio inter Danubo kaj Tiso. La tuta departemento estas ebenkaraktera, sekve ĝi montras ĉiujn trajtojn, kiuj apartenas al la Granda Ebenaĵo. Ĝian klimaton karakterizas ekstrema vetero, en kiu alternas sekaj someroj kaj malvarmaj vintroj. Malgraŭ la averaĝa temperaturo de 10 °C, somere okazas kelkfoje varmego de 35 °C kaj vintre malvarmo sub -20 °C. Granda avantaĝo de la Ebenaĵo estas la longdaŭra sunbrilo, kiu ebligas la produktadon de specialaj herbaĵspecoj.

La plej granda parto de la departemento apartenas al la regiono «Kiskunság» (kiŝkunŝag). La grundo de tiu teritorio devenas el la sedimento de la riveroj Danubo kaj Tiso, sekve ĝi konsistas plejparte el sablo.

Vicigante la konsiderindajn urbojn de nordo al sudo, ni komencu kun la «ĉefurbo» de la departemento: Kecskemét (keĉkemeet). Kun siaj 90 000 loĝantoj ĝi estas la plej granda urbo ne nur de la departemento, sed ankaŭ tiu de la tuta meza parto de Danubo kaj Tiso. De pluraj jarcentoj ĝi estas ekonomia kaj kultura centro de la regiono, unu el la plej karakterizaj ebenaj urboj. Kiel nodpunkto de diversaj veturlinioj, ĝin trairas kaj fervojaj ĉeflinioj kaj ŝoseoj.

Vidinda domo en Kecskemét (Foto de Z.Fejér)

La historio de la urbo komenciĝis jam en la dekkvara jarcento. Tiutempe ĝi estis posedaĵo de pluraj reĝionoj. Estante karakteriza malfermita urbo, neniam ĉirkaŭbaris ĝin fortaj muroj. En la vivo de la urbo estis grava periodo la turka okupacio, daŭrinta 150 jarojn. El la ĉirkaŭaj vilaĝoj la loĝantaro fuĝis, nur kelkaj privilegiitaj urboj restis plenaj, inter ili ankaŭ Kecskemét, kiel bieno de la sultano.

La malnovan urbon karakterizis interalie grandskala bestbredado, kiun poste kompletigis konsiderinda vinberkulturo. Post la dua mondmilito evoluis ankaŭ la industrio en Kecskemét. Precipe ĝia nutraĵindustrio kreskis okulfrape, sed krome la urbo donis lokon ankaŭ por pluraj maŝinkaj elektroindustriaj uzinoj.

La granduloj, kiuj estis naskitoj de la urbo: József Katona (1791-1838), la unua grava dramverkisto de Hungario kaj Zoltán Kodály (1882-1967), la konata komponisto kaj muzikpedagogo, pri kiu ni aperigis detalajn informojn en la pasintjaraj numeroj de HV (1982).

Bugac estas ankaŭ tutlande famiĝinta regiono de la departemento. Iam ĝi estis simbolo de la agrikultura konservatismo, kaj oni vicigis ĝin inter la ekzotikaj vidindaĵoj, kie miloj da sovaĝaj birdoj vivadis ĉirkaŭ la akvoj. Hodiaŭ parto de la malnova «pusta» (stepo) estas naturprotektita teritorio kaj apartenas al la Nacia Parko «Kiskunság». La centro de la stepo Bugac ankaŭ nuntempe estas la kantegmentita Ĉardo. De tie oni ekiras sur ĉevaltiritaj ĉaroj por viziti la karakterize hungaran brutaron, paŝtiĝantajn ŝafarojn, kaj spekti la sportecajn prezentojn de la rajdistoj. Kaj vespere kun lardorostado kaj apud gaja ciganmuziko finiĝas la multkolora programo.

Kiskunfélegyháza (kiŝkunfeledjhaza) havas 35 000 loĝantojn. La urbo naskiĝis en la dekkvara jarcento. Dum la mezepoka turka regado la urbo multe suferis. Filo de tiu ĉi urbo estas Ferenc Móra (1879-1934), progresema kaj grandefika verkisto. En la Muzeo «Kiskun» estas speciala kuriozaĵo la karcerhistoria ekspozicio, kiu estas unika en Hungario.

Kiskunhalas (kiŝkunhalaŝ), urbeto havanta 30 000 loĝantojn famiĝis pri la speciala punto de Halaŝ. Tiu produktaĵo de la urbo ricevis plurajn premiojn en folkloraj ekspozicioj de grandaj Eŭropaj urboj.

Apud Danubo ni trovas la urbon Kalocsa (kaloĉa), (20 000 loĝantoj),

József Katona



La Kodály-Instituto en Kecskemét

ĉeflokon de provinca distrikto. La historio de la urbeto komenciĝis en la 11a jarcento. La unua hungara reĝo, Stefano fondis tie ĉefepiskopan rezidejon kaj konstruigis katedralon, per kio li bazis la mezepokan evoluon de la urbo.

La brodaĵoj de Kalocsa estas unu el la plej konataj branĉoj de la hungara popolarto. La Popolarta Kooperativo de la urbo eksportas multajn popolbrodaĵojn en diversajn landojn de la mondo.

Baja kun siaj 38 000 loĝantoj estas unu el la interesaj «akvaj urboj». La ĉirkaŭaĵo de Baja estas elstare taŭga por kampado, sportoj ktp. Multaj vidindaĵoj troviĝas en la urbo mem. Krom la diversaj industriaj establaĵoj, Baja havas ankaŭ Akvomastrumadan kaj Porindustrian Altlernejon. La muzeo de Baja prezentas la ilojn de la iamaj fiŝkaptistoj.

La Esperanto-movado komenciĝis en la departemento dum la dekaj jaroj de la kuranta jarcento. Speciale en la urbo Kalocsa troviĝis vigla agado ĉe la tieaj grupoj (1912). Oni konstante varbis novajn kursanojn, aranĝis kurson post kurso por la komencantoj kaj dume sisteme okupis per variaj programoj la progresantojn. Pro la unua mondmilito ilia agado devis ĉesi, kaj la reviviĝo okazis nur en 1937.

Kalocsa ĝis nun konservis sian gvidrolon en la praktika apliko de la Internacia Lingvo. Ties bela kaj efika ekzemplo estis la Internacia Ŝakturniro, kiun aranĝis ĉijare en julio la Ŝakgrupo de la urbo.

En Kecskemét funkcias fakgrupo de fervojistoj kaj tiu de poŝtistoj.

La tuta esperantistaro de la departemento sumas ĉ. 400.

István *László*

Popolkostumo el Kalocsa (Foto de Z.Fejér)

La ĉefepiskopa rezidejo en Kalocsa (Foto de Z.Fejér)



Poemoj de Mihály Babits

Antaŭ 100 jaroj naskiĝis Mihály Babits (pron.: mihaj: balbiĉ), kiu apud Endre Ady estis la plej granda poeto de la t.n. unua Nyugat-generacio, eble la plej granda kreanto de la hungara burĝa poezio. Funde de liaj poemoj, verkitaj en perfekta formo kaj kun disciplinema tono, kaŝas sin obstuza pasio, tiu streĉiteco estas unu el la plej impresaj sorĉaĵoj de lia poezio. Komence de sia kariero li trovas la sencon de la vivo en la arto: laŭ lia opinio poeto devas forfermi sin el la socio en „eburan turon", kaj de tie observi la mondon, sin mem konservante pura. Tamen, iom post iom li rezignas pri tiu ĉi sia principo, unue per la pacpoemoj, verkitaj dum la unua mondmilito, kaj poste per la poemoj, kreitaj dum la dudekaj jaroj: en tiuj verkoj eksonas universala kunsento kun la suferantoj. Dum la disvolviĝo de la faŝismo li trovas necesa la politikan aktivecon de la arto. En la simbola epika poemo *Libro de Jona* li skribas jene: „inter kulpuloj estas komplic' la silentanto."

De 1933 li estas ĉefredaktoro de *Nyugat* kaj kuratoro de la plej grava hungara literatura fondaĵo, ĉio ĉi donas ne malgrandan potencon en liajn manojn, tamen, tio ne moderigas lian solecon, eĉ, la politikaj dekstro kaj maldekstro observas kun la sama suspektemo la poeton, kiu „apartenas al neniu".

Babits estas signifa novelisto kaj romanisto. Lia tradukista agado ankaŭ estas tre valora: li tradukis al la hungara la plenan *Dian Komedion* de Dante, *La Tempeston* de Shakespeare, kaj la poemojn de Baudelaire, Poe, Wilde. Grave li influis la kreadon de Kálmán Kalocsay, ne nur per siaj poemoj, sed ankaŭ per siaj redaktaj principoj. La modelo de la revuo *Literatura Mondo* estis sendube *Nyugat,* redaktita de Babits: tiamaniere konsiderinde li influis ankaŭ la evoluon de la Esperanta poezio.

Strato antaŭtagmeze

Estas milito. Nun brakumo
necesas: miks' de korp' al korpo,
ke oni havu kiujn murdi,
nek viv', nek morto malpliiĝu.
Kiom da nudo kaj incitoj!
Kuradas sur la strat' infanoj,
ĉiam pli, kvazaŭ etaj ratoj,
ĉiam pli multaj, pli ĉifonaj.
Ili kelkfoje tiel mire
rigardas, kvazaŭ demandante:
Kion vi volas pri ni? Kia
hered' atendas nin ĉi-tere?
Banknotojn niajn kiu ŝiris?
Kiu detruis niajn domojn?
Ĝardenojn kiu piedpremis?
Ĉu permesate fari tion?
Jen, eĉ la Teron ni ne venkis:
Ĝi skuas ŝarĝon en Tokio,
multegaj manoj de malsaĝaj
diaĵoj plenas ja de sagoj.
En la klinikoj hurlas febroj,
ĉi sovaĝbestoj kunpelitaj,
kaj la liberaj — en arbaro
de domoj aŭdas la vokhurlon.
Eĉ pan' ne estas dividita,
la fratoj divid-atendante
ja malsatmortas. La sekretoj,
ĉi tiuj vampirmonaĥinoj,
danĝeraj virgaj potencaĵoj
rikane sidas kaj insidas
kun nesolvitaj zono-nodoj.
Angoŝe kaj senlume kuŝas
en ŝton' statuoj kaj metaloj,
sin kaŝas kantoj en aero,
kaj steloj en ĉielo fora,
kiom! kiujn ni eĉ ne vidis,
Okuloj viaj petas stelon,
kaj ja plej bonus jam kaŝiĝi,
kiel ŝuldant' malbona, sub
nigraj jupoj de l' Fat-virino:
sed ve, ankoraŭ vipas Vivo,
kiun servadas eĉ la Mort',
disŝutas brulon stratoj brilaj,
kruroj kaj brustoj, kaj printempas.

El la hungara: K. *Kalocsay*

Nova jaro 1918

Muzik' apokalipsa furiozas
tra miaj nervoj, akuŝlit' Babela
estas la mond', en sanga suk' ĝi tremas
kaj grincas — ve — do kiu la turmenta
turmenta akuŝant'? Ĝi estas mi,
kaj vi, kaj ni, jam unuiĝis ĉiu
en ĉi turment-apokalipso, en
ĉi konvulsi' de sanga lit'. Ni kuras,
baraktas, kiel ratoj sub piedoj
gigantaj, ve! falĉiloj sangaj kaj
sensangaj fulmas en kadavrodora
aer' kaj gorĝe spiras nin la pest',
el ostpalacoj sonas fremdmuziko,
tempesto-paradizo senpordiĝas.
Kion vi diras, ter', ĉielo? Kion
vi trenas en terurajn novajn jarojn,
ĉiel'? La ter' silentas, froste cirklas
en sia nigra vintro, sed — ĝi foje
vekiĝos, kaj ĝi kion diros per
printempo sia bela, kion per
arbaroj detruitaj, kion per
la vivaj fortoj, per mil parolriĉaj
okuloj de kampfloroj ĝermaj sur
stoplejoj teruregaj — Homo, Homo,
diboĉa, misa hazardul', el nokta
kartludo, kampe sobriĝinte, kiel
rigardos vi en sovaĝflor-okulojn?

El la hungara: K. *Kalocsay*

Vespera demando

Se la vespero, ĉi karese flata
velurkovrilo nigra, mola, glata,
kiun dissternas vartistin' giganta,
la teron ame estas surkovranta,
kaj tiel zorge, ke post la surmeto
plu staras rekte herbo kaj floreto,
ne iĝas sulko sur la florfolio,
kaj sur flugilo ĉielarke brila
ne perdas la glazuron papilio,
kaj tiel ili sub velur' kovrila
ripozas, sub ĉi glata kaj karesa,
ke ili tute sentas sin senpeza:
tiam la vivo kien ajn vin gvidu,
aŭ hejme, en la bruna ĉambro sidu,
aŭ en kafejo gapu apud glaso
ekbrulon vican de l' sunluma gaso,
aŭ lace, kun la hund', sur mont' malgranda,
rigardu longe al la luno korna,
aŭ kun vi sur la polva vojo landa
veturu la koĉero duondorma,
aŭ sur balanca plank' de ŝipo mara
kapturnu, aŭ sur benko vagonara,
aŭ iru fremdan urbon kaj vagule
langvore haltu ie, stratangule,
miri la longajn forajn stratliniojn,
kaj la duvicajn lumajn lampradiojn,
aŭ ĝuste en la akva urb', sur Rivo,
dum flamoj floras en opalspegul',
sopiru plore je l' pasinta vivo,
kies memoro estas dolĉa brul',
je l' temp' pasinta, kiu, kvazaŭ sorĉa
lampet', jen brilas, kaj jen estas for,
kies memoro varma, dolĉmaldolĉa
estas samtempe ŝarĝo kaj trezor':
jen, tie via kapo pezmemora
kliniĝos lace al la ter' marmora,
kaj inter beloj kaj plezuroj, drone,
tamen pri tio pensos vi poltrone:
por kio do ĉi belo kaj ĉi bril'?
Tamen pri tio pensos vi, orfkora,
kial silk-akvo? kaj marmor' kolora?
Kial vesper': flugila terkovril'?
Kial montetoj? kial la branĉretoj?
La maro kiun ne semadas hom'?
Kial la fluoj, refluoj sen finoj,
la nuboj, ĉi brula Sizifosa ŝton'?*
Kial memoroj, printempo, aŭtunoj?
Kial la lampoj, kaj kial la lunoj,
kial la nefinebla Temp-lini'?
Aŭ, jen ekzemplo de la herb' malforta:
kial ĝi kreskas, se ĝi velkos morta,
kial ĝi velkas, se rekreskos ĝi?

* Sizifa

El la hungara: K. *Kalocsay*

*

Naiva balado

en kiu la poeto rakontas, ke li foje vidis grandajn knabinarojn kiuj povis murdi animojn per lilioj, kaj, ke li timis ilin, kaj ke li petis ilin, ke ili indulgu lian animon, ĉar la animo de l' poeto estas trezoro de ĉi mondo.

Mi vidis grandajn knabinarojn,
knabinajn arojn kun lilio,
dum la anim' en konvulsio
luktis kun suproj el glacio,
kaj kun venena florfolio
de murdnarkota flor', lilio,
mi vidis veni knabinarojn
kaj diris: „Knabinoj, mi estas
almoza vagabond',
sed se mi mortos, tamen
malriĉos ja ĉi mond'."

Ili ridis, kaj mi diris nun:
„Mi estas reĝo, ŝipogvide
genupremante ondojn ride,
kiel virbovon Mithras side,
ŝipjugon mi surfetis bride,
mi estas reĝo ŝipogvide."
Ili ridis kaj mi diris nun:
„Kaj eble ne estis mi reĝo,
nur bubo, subŝipan',
sed se mi mortos, tamen
dronos ocean'."

„Alpremis ame ĉion novan,
ĉion malnovan miaj brakoj,
mi naĝis tra riverzigzagoj,
dancis sub ebriaj ŝipflagoj,
putris mute sur mukaj lagoj,
ĉion malnovan miaj brakoj
alpremis ame, ĉion novan,
anim' mia: trista muziko,
ĝian ritmon vivis mi,
kaj se mi mortos, unu
okulon fermos Di'."

El la hungara: K. *Kalocsay*

Zigzage inter kongresanoj...

Iom pli ol 5000 esperantistoj partoprenis la 68-an Universalan Kongreson de Esperanto en Budapeŝto. Nia raportisto iom zigzagis inter la kongresanoj, kaj intervjuis kelkajn el ili. Li elektis ne eminentulojn, vaste konatajn aktivulojn, sed «simplajn» esperantistojn, kiuj «nur» uzas la lingvon por siaj ordinaraj celoj. La temo de la intervjuoj ne estis fiksa: la demanditaj esperantistoj parolis pri sia rilato al Esperanto, eldiris sian opinion pri la ŝancoj de la paco, pri la problemoj de la nuntempa mondo. Jen, parolas la kongresanoj...

Prof. Franjo Gruič (Jugoslavio, kongresnumero 686) el la urbo Djakovo estas romkatolika pastro, en 1951 li komencis lerni la Esperanton kiel gimnaziano. Unue li aŭdis pri tio, ke tiu lingvo estas konfuza kompilaĵo, sed kiel pensanta homo li decidis trastudi ĝin kaj poste formi opinion. Poste li konvinkiĝis pri tio, ke tiu lingvo havas elstaran logikon kaj tio faciligas la lernadon. Fine li tuj ekŝatis ĝin kaj ĝis nun li uzas Esperanton. Li opinias, ke multe da homoj ne havas konojn pri la lingvo, tial ili estas indiferentaj. Li estas konvinkita, ke Esperanto bone servas la pacon. Li, kiel pastro, ne okupiĝas pri la monda politiko, sed kiel kristano fidele li sekvas la vortojn de Kristo, kiu predikis pacon kaj amikecon inter la homoj. En tiu ideo ne estas diferenco inter la eklezioj kaj aliaj pacorganizaĵoj. Sendepende de la koloro de haŭto li amas kaj estimas ĉiun homon bonvolan.

Fraŭlino Järvinen Selma (Finnlando, kongresnumero 1042) el la urbo Lauritsala. Ŝi ekde 1949 uzas Esperanton kiel tre ŝatatan lingvon, kaj ŝi tiel sentas, ke tiu lingvo malfermas fenestron al la mondo. Ŝi havas telefonon kaj ties fadeno povas fari amikan kontakton preskaŭ al la tuta mondo. Ŝi jam bone konas la voĉon de siaj geamikoj kiujn ŝi ĝis nun persone ne vidis, kaj ili vivas en ŝia fantazio kiel belaj kaj bonaj homoj. En ŝia urbo ekzistas 20 geesperantistoj, sed multajn homojn ne interesas la t.n. artefarita lingvo, tamen ili tute ne estas malamikoj, sed indulgeme ridetas pri la obseditaj personoj. Ŝi forte amas la pacon, kaj ŝi sentas sin naiva, ĉar ŝi tute ne komprenas, kial murdas unu homo la alian, kaj kial ne estas tia harmonio ĉie, kia estas dum la Esperantaj kongresoj.

Ges-roj Bos (Nederlando, kongresnumeroj 845-850) el la urbo Eindhoven estas ĉarma maljuna geedza paro, kiuj komencis lerni Esperanton kune en 1962 en la sama urbo, kie ili nun loĝas. La instigo estis, ke la loka Esperanto-klubo anoncis eblecon por veturi eksterlanden, sed la kondiĉo estis, ke oni devas lerni nian lingvon. Ili ŝatas ĉiam restadi hejme, sed ankaŭ ŝatas ekkoni la mondon, sed pro la nescipovo de diversaj lingvoj ili ne partoprenas en la aranĝoj de fremdultrafikaj oficejoj. En la UK ili estas feliĉaj, ĉar ili povas paroli kun eksterlandanoj per la sama lingvo. Pri la paco kaj milito ili tute ne volas paroli, ĉar ili havas tre timindan rememoron pri la dua mondmilito kaj tiu evento malbonigus la emocion de tiu admirinda kongreso. Unue ili partoprenis la Budapeŝtan UK (1966), la Lucernan (1979) kaj la Antverpenan (1982), fine la Budapeŝtan nunan kongreson (1983), kie ĉio tre plaĉas al ili. Nun la saldo estas: de Budapeŝto ĝis Budapeŝto.

S-ro Wouter Pilger kaj lia edzino Janina Pilger-Bugaj (Nederlando, kongresnumeroj 154, 637) el la urbo Lelystad estas juna geedza paro. La viro naskiĝis en Nederlando, la edzino estas polino, kaj ili interkonatiĝis en la hungara urbo Pécs, dum la 22-a Internacia Junulara Kongreso. La viro komencis lerni la lingvon en 1958 kaj la edzino en 1960. Post la konatiĝo ili vigle korespondis, fine en 1970 ili geedziĝis en Danlando, kie la viro tiam estis instruisto. La edzino ne scipovas bone la nederlandan, la edzo ne la polan lingvon, tiamaniere ili komunikiĝas ofte nur pere de Esperanto. Iliaj gefiloj, la 11-jara Silvia kaj la 5-jara Michel preskaŭ perfekte parolas la Esperanton, la nederlandan kaj la polan lingvojn.

Kusztos Georg (Danlando, kongresnumero 542) el la urbo Vaerlose per biciklo alvenis al la Budapeŝta kongreso. Li estas pensiita instruisto. Li komencis lerni Esperanton en 1952. Li havas du hobiojn: la interesiĝon pri diversaj lingvoj kaj la veturadon per biciklo. En 1952 li ekkonis Esperanton kaj tre facile ellernis ĝin, ĉar helpis lin la scipovo de aliaj lingvoj kaj la logika gramatiko, eĉ la multaj konataj vortoj faris al li plezuron. Per biciklo li vizitis la kongresojn en Stockholmo (1980) kaj pasintjare en Antverpeno. La plej longa veturado per biciklo estis, kiam el Stockholmo li vizitis Israelon kaj la ĉirkaŭajn landojn. En ĉiuj landoj, kie li renkontis esperantistojn, ili amike kaj volonte helpis lin. Nur pro la ŝato de Esperanto li biciklis ĝis nun pli ol kvin mil kilometrojn. En diversaj landoj li multe aŭdis pri MEM, sed li scias pri ĝi malmulte; dum la nuna kongreso li serĉas kontakton kun ĝi, ĉar ankaŭ li sopiras la pacan kunekzistadon.

Fraŭlino Christiane Schweizer (GDR, kongresnumero 4744) el urbo Dresden estas juna bela blondulino. Ŝi estas scienca bibliotekistino kaj eklernis Esperanton en 1981, ĉe la vespera lernejo. Vere admirinda estas ŝia entuziasmo al Esperanto, ĉar ŝi dum tiu mallonga tempo jam havas pli ol cent konstantajn gekorespondantojn; kiel ŝi diris, la aĉetitaj poŝtmarkoj estis pli pezaj ol ŝia somera vesto. Ŝi nun unuafoje partoprenas Universalan Kongreson en Budapeŝto kaj ŝi estas ravita pro la amika etoso,

kiu regas inter la bonvolaj homoj. Ŝi multe legis kaj aŭdis pri la teruraĵoj de la du mondmilitoj, kaj kompreneble ŝi deziras pacon. Ŝi ne estas ano de MEM, sed ŝi tenas bonan kontakton kun ĝi, ŝi volas sekvi la intencon de Zamenhof, ĉar la nuna saĝa junularo ne volas novan militon. Ŝi laboras kaj faras ekspozicion en la kadro de la Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo (IFER) en Leipzigo.

Fraŭlino Neli Popova (Bulgario, kongresnumero 4777) el urbo Varna. Ŝi eklernis Esperanton en 1958, ĉe la urba societo «Albatroso». Ŝi laboras, kiel administrantino ĉe la urba Konsilio, vivas kun sia patrino kaj ege ŝatas labori en la ĝardeno. Ŝi partoprenis la UK-n en Sofio (1963), Varna (1978) kaj la nunan en Budapeŝto. Ŝi ofte vizitas la urban klubon kaj volonte akceptas gastojn, preskaŭ ĉiuj gekorespondantoj jam vizitis ŝin. Ŝi estas ano de la Nacia Popolfronto kaj kun multaj geesperantistoj helpas tiun movadon. Ŝi laŭ la financa ebleco ege ŝatas partopreni la diverslandajn kongresojn, eĉ la landajn kunvenojn por praktiki la lingvon kaj ekkoni siajn gekorespondantojn persone, sed ŝi diris, ke ŝi estas nur simpla, kvankam fidela soldato de Esperanto.

S-ro Äke Eldh (Svedujo, kongresnumero 1361) el la vilaĝo Sköldinge alvenis, li estas ligna fabrikisto, kiel ankaŭ la prauloj dum jarcentoj. Li komencis lerni Esperanton en la jaro 1934, post la kongreso en Stokholmo. Li lernis aŭtodidakte el diversaj libroj kaj gazetoj. En lia vilaĝo nur unu persono parolas Esperanton krom li, sed ili ambaŭ estas entuziasmaj. Li partoprenis kongresojn en Bern (1947), Malmö (1948), Stokholmo (1980), Hungario (1983). Li ege ŝatas viziti la kongresojn, ĉar li povas paroli perfekte kun diverslandaj homoj. Lia edzino sufiĉe bone parolas nian lingvon ekde 1942, sed liaj tri filoj bedaŭrinde ne. Li timas pro la nuna situacio koncerne la pacon. Li ŝatus, se estus daŭra paco. Li travivis la du mondmilitojn, suferis multe, kiel privata laboristo li sentas la diferencon inter la paca kaj milita periodoj. Li estus egoisto, se li dezirus la pacon nur por Svedio, ĉar dise en la tuta mondo vivas sentantaj homoj.

S-ino Isiguro Namiko (Japanio, kongresnumero 4465) el la urbo Tokio. Ŝi estis vestita en japana kostumo. Ŝi jam dufoje vizitis Hungarion, kaj ŝi tre simpatias kun la hungara popolo, ŝi sentas ian muzikan sonon en la hungara lingvo. Ŝi eklernis Esperanton en Tokio, ŝia edzo estis eminenta esperantisto, pacdefendanto kaj ano de MEM, li gvidis multajn kursojn en kluboj kaj en sia propra domo, tiamaniere vole-nevole ŝi estis perfekta parolanto jam en 1963. Ŝi korespondas kun 25 personoj, ankaŭ el Hungario. Ŝi apartenas al la Virina Komitato en Tokio kaj ekde 20 jaroj ŝi konstante aktivas ĉe la Esperanta Virina Asocio (EVA). Bedaŭrinde ŝia edzo antaŭ du jaroj forpasis, tiu evento estas granda perdo por ŝi, ankaŭ por Esperanto. Kiam en Tokio okazis la UK, ŝi kun sia edzo multe laboris, tiu tempo estas kvazaŭ bela sonĝo. Kun granda ĝojo ŝi partoprenis la kongresojn en Tokio (1965), Budapeŝto (1966), Vieno (1970), Antverpeno (1982) kaj nun denove en Budapeŝto (1983).

S-ro Lamačka Jan (en la adresaro erare estas skribita «Kukuĉka», Ĉeĥoslovakio, kongresnumero 2096) alvenis el la urbo Trenĉin, kie estas pli ol 100 esperantistoj. Li eklernis Esperanton en 1935. Lia originala profesio estas tekstilteknikisto, sed li laboris en librovendejo, kaj la ĉefo montris al li libron pri Esperanto. Li ne tralegis ĝin, li tute ne sentis emon lerni tiun artefaritan lingvon. Tamen poste pro scivolemo li trafoliumis ĝin, kaj tuj li aliĝis kaj finis kurson. Li iĝis ano de Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko, kaj ekde tiu tempo la bacilo de Esperanto tute infektis lin. Li partoprenis kongresojn en Stokholmo (1980) kaj en Budapeŝto (1983), sed li havas multajn korespondantojn, kaj pere de Esperanto li vizitis Sovetunion, Hispanion, Francion, Rumanion, Bulgarion, Jugoslavion, ambaŭ Germaniojn ktp. Li konstante redaktas Esperanto-rubrikon en la lokaj gazetoj «NEDELA» (dimanĉe) kaj «SMENA NA NEDELU» (junulara gazeto). Li bone konas kaj simpatias kun MEM, krome li faris konstantan kontakton pri Astronomio inter hispana urbo Sabadell kaj la ĉeĥa urbo Gottwaldow.

S-ro Merger Maurice (Francio, kongresnumero 342) el urbo St. Julien-les Villas kaj *Anna Bessenyei* (Hungario, kongresnumero 4851) el la urbo Budapeŝto, sidis en la koridoro unu apud la alia kaj vigle paroladis. Ili interkonatiĝis ĉe la rendevua tabulo, eksciinte tion, ke ili ambaŭ estas pedagogoj. S-ro Merger estas emerita instruisto kaj en 1974 li eklernis Esperanton en la urbo Andernos, kie li pasigis la someran libertempon. F-ino Bessenyei diplomiĝis en Budapeŝto pri historio, rusa lingvo kaj Esperanto. Ŝia unua kongreso estas la nuna en Budapeŝto. S-ro Merger partoprenis la kongreson de SAT en Swanwick (1976), UK en Varno (1978) kaj nunan en Budapeŝto, krome li partoprenis multajn enlandajn kaj eksterlandajn kunvenojn. Fine li hezitis, inter UEA kaj SAT, ĉar ĉie li trovis ian fundamentan faktoron, kiu ne plaĉis al li, tial li mem fondis lokan grupon, kie komune partoprenas la UEA- kaj SAT-anoj en granda harmonio. Li tre simpatias kun MEM kaj dek lokaj personoj abonas la revuon PACO, kiu pro la nobla enhavo estas inda por la apogo. En St. Julien ekzistas ĉirkaŭ 100 esperantistoj, el kiuj 50 bonorde pagas kotizon por la loka grupo. S-ro Merger laboras ĉe la loka radiostacio kaj konstante instruas Esperanton kun muzikaj diskoj, kiun la junularo tre ŝatas kaj ekzistas granda interesiĝo. Ambaŭ pedagogoj intencas fari amikan kontakton pere de nia lingvo, Esperanto.

Szilárd *Bálint*

Paĝo de originala poezio

O. Kníchal

Lando promesita

Pejzaĝ' bizara de ĉiutago
maŝinveado sirene orelŝira
penegas fabrika dungitaro
Ekstere
mura'rempar' kurtenas. Tie
ŝtonpezas pandonanto
por statu' pri la senkompato

Tamen pikdrato striktas pli
El kamentuboj
ĉielascendas anĝeloj po mil
sube deprenoj akcesoraj
kiteloj, infanŝuoj, harplektaĵoj
Siringoj primaveraj kondolencas
post rikolt' gehena

Tamen
omenon spiras frida tero
la nun' regalas per futuro
aŭreole glima
en flam' de l' anatemoj. Tamen
konstante trakradas
lazuro...

Venu
rekrutoj de la Aŭroro
kun viaj koŝmaroj kaj neinklinoj
kun idolrompiloj
pro feliĉ' akapara
sub stelo dolĉamara
Kavaliroj
kun pravo psalme rava

Julio Varga

Ĉevalo

kun peza ŝarĝ' aŭtun-vespere
stumbladis pene, senespere.
(Samkiel homoj)

Kaleŝo venis ĝuste tiam,
antaŭis ĝin, la apatian
rapide, fluge.

Sed ĝia sango tuj ekbolis,
galopis, ĝin atingi volis.
(Samkiel homoj)

Nur kurta estis la ĉaspelo,
ja vana estas la ribelo,
softiĝis paŝoj.

Fiasko! Duobliĝis ŝarĝ' subite,
sen celatingo haltis ĝi venkite.
(Samkiel homoj)

Imre Szabó

Du kolomboj

Du ĉizitaj kolomboj
tre mallerte ĉizitaj
sur la ligno de lulilo

Du broditaj kolomboj
tre mallerte broditaj
sur la ĉemizo knabina

Du pentritaj kolomboj
tre mallerte pentritaj
sur la muro de kuirejo

Du skulptitaj kolomboj
tre mallerte skulptitaj
sur la ŝtono de tombo.

Aldo de' Giorgi

La Kiso

Eterna ampoemo,
sveno karusela,
ŝvela kaj vertiĝa.
Rito senlatituda,
universala.
Sub volb' ĉiela aŭ plafona,
aŭ katedrala
plektiĝas fajne, miele
tuŝ' mukoza
kaj anima
(senlima ĝu' torpora).
La buŝ', la lango intermite,
trafike lulas
ludojn milnuancajn
(dancaj foluloj piruetas sparke,
arke super perceptoj).
Elanoj senrbidas poezie,
pasie aŭ tenere
fluadas versoj senparole.
Mole, la lipalgluo,
treme, karestuŝete,
aŭ turbulentincite,
(spite la spiranhelon)
trenas konsciojn droge
en elizeajn ŝvebojn,
al paradizaj kampoj
de ekstazo.
Frazo mirakla, eĉ se iluzia:
Mi vin amas!
Konkludo dia,
kontrakto kaj sigelo,
aŭ ĉiela kompromiso:
Kiso!

KONGRESA PANORAMO

Plej supre: dum la Inaŭguro ĉarmaj hungaraj infanoj salutis per floroj ne nur la podianojn, sed ĉiujn elstarajn gastojn de la Kongreso.

Supre, maldekstre: la sukcesa jubilea MEM-kunveno enhavis ankaŭ kulturprogramon. Sur nia foto: kantistino Anna Kiss, kies belegan voĉon oni povas aŭdi ĉiam pli ofte dum esperantistaj aranĝoj.

Supre, dekstre: dum la UK kunsidis ankaŭ la Akademio de Esperanto. Sur nia foto: sep esperantistaj „senmortuloj". (Foto de Zoltán Fejér.)

Malsupre, maldekstre: d-ro Ottó Haszpra, direktoro de la Budapeŝta Scienca Eldona Centro de UEA pritraktis kun la koncernaj fakuloj la eblojn de plua agado sur scienceldona kampo. (Foto de Z. Fejér)

KONGRESA PANORAMO

Plej supre, maldekstre: Renkontiĝo de verkistoj kun la legantoj, kiu verŝajne fariĝos tradicia ero de la sekvaj UK-oj.

Supre, dekstre: 15-a jarkunveno de la Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-Asocio.

Maldekstre: Kunveno de la Internacia Naturista Organizo Esperantista.

Malsupre: Post la prezentado de la „Malnovmoda komedio" la direktoro de la Kulturcentro „Pataky" salutas la jubileantajn geaktorojn Belka Beleva kaj Anani Anev. (Fotoj de Zoltán Fejér.)

KONGRESA PANORAMO



La kooperativa Esperanto-agado dum la lastaj jaroj signifé vigliĝis. Tion bele demonstris ankaŭ la 2a Kooperativa Konferenco, okazigita dum la 68a UK en Budapeŝto. En la konferenco partoprenis esperantistoj-kooperativanoj el dudeko da landoj, kaj ankaŭ pluraj gvidantoj de la hungara kooperativa movado, inter ili d-ro István Szlameniczky, prezidanto de la Asocio de Hungaraj Kooperativoj kaj d-ro József Pál, sekretario de tiu Asocio. D-ro Pál estas esperantisto, eĉ, estrarano de HEA. (Fotoj de Zoltán Fejér.)

KONGRESA PANORAMO



Supre, maldekstre: Grégoire Maertens, la „malnova" kaj „nova" prezidanto de Universala Esperanto-Asocio. Dum la kongresa semajno li certe ne ripozis: li prezidis aron da komitatkunsidoj, donis amason da intervjuoj, akceptiĝis ĉe diversaj neesperantistaj instancoj, altigante tiel la reputacion de nia Movado.

Supre, dekstre: Sceno el la dumbala modparado.

Maldekstre: Post la lasta teatra prezentado, vendrede vespere okazis akcepto por ĉiuj kontribuintoj de la kulturaj programoj. Sur nia foto d-ro Imre Pethes, vicprezidanto de LKK gratulas la plej junan aktoron, Rikardon Horváth. (Fotoj de Zoltán Fejér.)

Plej malsupre: Sceno el la amuza kvizo „Kion vi scias pri Hungario?" Magda Bruzsa, reklamvarbistino de HEA (maldekstre) jam preparas la donacon por la ĝusta respondo.

Esperantaj libroj el Hungario

La subaj libroj estas aĉeteblaj ĉe la Libroservo de Hungara Esperanto-Asocio (Budapest VIII. Kenyérmezo u. 2.), ĉe la Libroservo de Universala Asocio, aŭ ĉe libroservoj de landaj Esperanto-organizaĵoj. Esperantistoj en GDR turnu sin al la Hungara Kulturcentro en Berlin; en Ĉeĥoslovakio Bulgario kaj Pollando al sia landa Esperanto-Asocio. En Sovetio oni povas mendi niajn librojn ĉefe per la librovendeja reto Druĵba, kvankam tiu laŭ niaj informoj ne en ĉiu respubliko funkcias kun egala efikeco.

A/ Lernolibroj, vortaroj, bildstrioj

1. **Lienhardt, A.: Amuzaj dialogoj.** (Sprita studmaterialo por progresigaj kursoj.) 21 cm, 144 p. Prezo: 13,80 gld.

2. **Szerdahelyi, I.: Esperanto Internacia.** (Rektametoda lernolibro por komencantoj.) 24 cm, 260 p. Prezo: 9,- gld.
3. **Szerdahelyi, I.: Esperanto 2.** (Rektametoda lernolibro por progresantoj.) 24 cm, 227 p. Prezo: 9,- gld.
4. **Esperanta-Kamboĝa Vortaro.** 20 cm, 148 p. Prezo: 18,- gld.
5. **Baghy, J.: Gramatika demandaro resuma.** (Didaktikaj demandoj kaj respondoj pri gramatiko.) 20 cm, 40 p. Prezo: 6,- gld.
6. **Golden, B.: Marĝene de la lernolibro.** (Prilingvaj artikoloj por kursfinintoj.) 20 cm, 70 p. Prezo: 6,60 gld.
7. **Oklingva nomaro de Eŭropaj birdoj.** (Angla-germana-rusa-pola-ĉeĥa-latina-hungara-Esperanta.) 28 cm, 138 p. Prezo: 9,- gld.
8. **Taskofolioj por komencantoj.** (32 taskofolioj en formato A4.) 28 cm, 32 folioj. Prezo: 6,- gld.

9. **Baghy, J.: La Verda Koro.** (Romano por komencantoj, verkita kun granda didaktika disciplino. Kun gramatika resumo kaj vortlisto. Uzebla ankaŭ kiel lernolibro por komencantoj.) 20 cm, 104 p. Prezo: 12,- gld.



10. **Jókai, M.: La filoj de l' ŝtonkora homo.** (Bildrakonta adaptaĵo de romantika hungara romano pri liberbatalo en la pasinta jarcento.) 24 cm, 64 p. Prezo: 6,- gld.
11. **Gárdonyi, G.: Steloj de Eger.** (Bildrakonta adaptaĵo de hungara junulara romano, kies agado disvolviĝas en la 16a jarcento, dum batalo kontraŭ la turka invado.) 24 cm, 64 p. Prezo: 6,- gld.
12. **Prus, B.: La Faraono.** (Bildrakonta adaptaĵo de fama pola klasika romano pri la antikva Egiptio.) 24 cm, 44 p. Prezo: 4,80 gld.
13. **Twain, M.: La aventuroj de Tom Sawyer.** (Bildrakonta adaptaĵo de klasika usona junulara romano.) 24 cm, 32 p. Prezo: 4,80 gld.

14. **Twain, M.: La aventuroj de Huckleberry Finn.** (Bildrakonta adaptaĵo de klasika usona junulara romano.) 24 cm, 32 p. Prezo: 4,80 gld.

B/ Beletro

Originalaj verkoj:

15. **Dudek kvin jaroj. Antologio de Belartaj Konkursoj 1951-1975.** Red.: W. Auld kaj V. Benczik. 19 cm, 208 p. Prezo: 13,80 gld.
16. **Grigorov, A.: Gardu la pacon!** Poemaro. 19 cm, 120 p. Prezo: 10,80 gld.
17. **Huleŝ, A.: Katoj kaj ĉevaloj.** Poemaro kun profunda filozofio kaj lingva eksperimentemo. 20 cm, 80 p. Prezo: 12,- gld.
18. **Lejzerowicz, I.: El la «Verda Biblio.»** Satira priskribo de la Esperanto-movado, kun karikaturaj ilustraĵoj. 18 cm, 84 p. Prezo: 8,10 gld.

19. **Lorjak: Iluzioj.** Dek noveloj de la populara prozisto, unu ankaŭ en angla, kaj du en franca traduko. 20 cm, 184 p. Prezo: 18,- gld.



20. **La kato en la sako.** (Red. V. Benczik) Verkoj de Auld, Boulton ktp. 16 cm, 133 p. Prezo: 2,40 gld.
21. **Modest, J.: Ni vivos!** Dokumenta dramo pri la vivo de Lidia Zamenhof. Sukcese prezentita dum la 68a UK. 20 cm, 53 p. Prezo: 8,10 gld.

22. **Nemere, I.: La blinda birdo.** Romano, en avertura stilo, pri la libereco de individuo. 20 cm, 118 p. Prezo: 15,- gld.

23. **Nemere, I.: La fermita urbo.** Sciencfikcia romano, kun paralelaj agadoj en la 15-a kaj 26-a jarcentoj. 20 cm, 128 p. Prezo: 13,80 gld.
24. **Nemere, I.: La naŭa kanalo.** Noveloj. 122 p, 20 cm. Prezo: 13,80 gld.

25. **Nemere, I.: Sur kampo granita.** Romano pri oficiro de la germana armeo, kiu post 25 jaroj revenas en italan vilaĝon, kie li ekzekutigis familion... 20 cm, 124 p. Prezo: 15,- gld.
26. **Tóth, E.: Lappar, la Antikristo.** Noveloj. Gajninta la premion «Libro de la Jaro 1982». 19 cm, 144 p. Prezo: 13,80 gld.

Tradukitaj verkoj:

27. **Benedek, E.: Hungaraj fabeloj.** (Dek ilustritaj popolfabeloj.) 20 cm, 70 p. Prezo: 9,90 gld.
28. **Gajdar, A.: Timur kaj lia taĉmento.** (Klasika junulara romano de la soveta literaturo.) 20 cm, 74 p. Prezo: 8,10 gld.



29. **Heltai, J.: La Morto kaj la kuracisto.** (Rakonto kun paralelaj tekstoj en la hungara kaj Esperanto.) 20 cm, 18 p. Prezo: 1,80 gld.
30. **Hundbazaro.** 33 porinfanaj poemoj el la hungara literaturo. Red.: P.A. Rados. Ilustrita. 18 cm, 68 p. Prezo: 10,20 gld.

31. **Hungara Antologio.** Red.: V. Benczik. Specimenoj el la hungara literaturo ekde la 12a jarcento ĝis nun. 24 cm, 447 p. Tole bindita. Prezo: 57,- gld.



32. **Kalocsay, K.: Tutmonda Sonoro I-II.** (Riĉa antologio de la monda poezio en majstra traduko.) 20 cm, 664 p. Bindita. Prezo: 66,- gld.



33. **Karinthy, F.: Vojaĝo al Faremido — Kapilario.** (Du romanoj de hungara universala satiristo.) 18 cm, 182 p. Prezo: 13,80 gld.
34. **Kemalov, N.: Naŭ jaroj en la infero.** (Rememoroj de bulgara esperantisto pri la kontraŭfaŝisma lukto.) 20 cm, 111 p. Prezo: 12,- gld.
35. **Krilov, A.: 111 fabloj.** (La plej spritaj fabloj de la granda rusa poeto.) Ilustrita. 18 cm, 144 p. Prezo: 12,- gld.

36. **Krúdy, Gy.: La rozo de l' sultano.** Fabela rakonto el la 17a jarcento. 14x20 cm. 54 p. Riĉe ilustrita. Prezo: 9,90 gld.

37. **Molnár, F.: La knaboj de Paŭlostrato.** (Junulara romano de la mondkonata dramverkisto.) 188 p. 19 cm. Prezo: 13,80 gld.
38. **Móricz, Zs.: Ĉiela birdo.** (Amrakonto kun drama atmosfero el hungara vilaĝo.) 20 cm, 44 p. Prezo: 8,10 gld.
39. **Móricz, Zs.: Malriĉaj homoj.** (Animskua kontraŭmilita rakonto pri soldato, kiu reveninte el la milito daŭrigas la murdadon.) 24 cm, 36 p. Prezo: 2,40 gld.
40. **Velkov, K.: Vilaĝo Borovo.** Romano tradukita el la bulgara. 20 cm, 148 p. Prezo: 12,- gld.

C/ Pri lingvo, movado, literaturo

41. **Baza Literatura Krestomatio.** (Dua, ampleksigita eldono, kun biografietoj de la prezentitaj aŭtoroj. Ĉ. 130 verkoj aŭ fragmentoj de verkoj donas superrigardon pri la esperanta literaturo ekde Zamenhof ĝis Nervi.) 19 cm, 276 p. Prezo: 13,80 gld.

42. **Gvidlibro por supera ekzameno.** Red.: A. Pechan. (Historio-literaturo-metodiko de Esperanto.) 19 cm, 358 p. Prezo: 15,- gld.



43. **Blanke, D.: Pri la Interna Ideo.** (Studo.) 20 cm, 29 p. Prezo: 3,- gld.
44. **Tarkony, L.: De paĝo al paĝo.** (Eseoj pri la Esperanta literaturo.) 19 cm, 121 p. Prezo: 12,- gld.

D/ Komputado

45. **Kibernetiko de la homa lingvo.** Red.: H. Frank. Materialo de la IX-a Internacia Kongreso de Kibernetiko. 20 cm, 192 p. Prezo: 15,- gld.
46. **Komputilteknika vortaro hungara-angla-germana-rusa-Esperanta.** 19 cm, 464 p. Bindita. Prezo: 18,- gld.
47. **Mikrokomputilo.** (Artikolaro pri la personaj komputiloj.) 24 cm, 60 p. Prezo: 7,50 gld.
48. **Apliko de komputiloj en industrio kaj administrado.** 14 prelegoj de Interkomputo '82. 24 cm, 215 p. Prezo: 18,- gld.
49. **Apliko de komputiloj en psikologio, medicino kaj agrikulturo.** 10 prelegoj de Interkomputo '82. 100 p. 24 cm. Prezo: 9,- gld.





50. **Homa lingvo kaj komputilo.** 12 prelegoj de Interkomputo '82. 24 cm, 172 p. Prezo: 18,- gld.
51. **Matematiko, instruado de matematiko kaj komputotekniko.** 19 prelegoj de Interkomputo '82. 24 cm, 212 p. Prezo: 18,- gld.
52. **Mikrokomputiloj, periferioj kaj aplikoj.** 17 prelegoj de Interkomputo '82. 24 cm, 204 p. Prezo: 18,- gld.
53. **Teoriaj kaj praktikaj problemoj de programado.** 18 prelegoj de Interkomputo '82. 24 cm, 223 p. Prezo: 18,- gld.



E/ Ceteraj temoj

54. **133 tagoj.** (Artikoloj kaj literaturaĵoj pri la unua hungara proleta ŝtato en 1919.) 19 cm, 244 p. Ilustrita. Prezo: 12,- gld.
55. **Metodiko en praktiko.** Red.: Zs. Barcsay. (Artikoloj pri la metodiko de lingvoinstruado.) 20 cm, 140 p. Prezo: 15,- gld.
56. **Programdeklaro de la Hungara Socialisma Laborista Partio.** 18 cm, 41 p. Prezo: 1,20 gld.
57. **Sciencaj Komunikaĵoj 1976.** (Artikoloj pri diversaj sciencoj.) 24 cm, 100 p. Prezo: 12,- gld.
58. **Sciencaj Komunikaĵoj 1977.** 24 cm, 100 p. Prezo: 12,- gld.
59. **Sciencaj Komunikaĵoj 1979.** 24 cm, 84 p. Prezo: 12,- gld.
60. **Turista Kantaro** (51 kantoj kun muziknotoj.) 20 cm, 84 p. Prezo: 8,10 gld.
61. **Urbo Tata.** (Gvidlibro pri malgranda hungara historia urbo.) 20 cm, 36 p. Prezo: 1,50 gld.



Árpád Nagy

Tri jardekoj por la moderna hidrotekniko

Fina parto

En la laborkampo de la Hungarlanda akvomastrumado la plej granda konstruentrepreno — la *Entrepreno por Akvoaferaj Konstruadoj* — havas gravegan komision: ampleksigi la akvoprovizadon en la loĝlokoj, kaj ebligi al la loĝantaro havi kondukitan akvon. Tiurilate dum 3 jardekoj ĝi akumulis vere multajn kaj atentindajn fakajn spertojn, kiuj meritas disvastigon krom al la faka publiko ankaŭ al ĉiuj, kiuj interesiĝas pri tiu monde grava zorgo: provizi ĉie ajn la loĝantaron per pura, bongusta kaj sana akvo. Ties gravecon emfazi aparte por la legantoj de HV estus certe superflue.

Programo pri akvoturoj

En regionoj da ebenaĵoj la plej postulema instalaĵo de la akvoprovizado estas certe *la akvoturo*. En nia unua artikolo estis jam menciite, ke la entrepreno VIZÉP depost 1966 konstruas akvoturojn per *kaliko-leva tekniko.* Komence, la de ĝi disvolvita lev-aparato kapablis je 65 m levi la kaliko-forman cisternon de maks. 750 t maso. Tiamaniere estis konstruitaj akvoturoj, kun 600-2000 m^3 volumeno.

Intertempe kreskis la akvobezonoj kaj konekse ankaŭ la neceso por pli grandaj alt-cisternoj, kiujn la supra konstrumetodo jam ne povis plenumi. La Landa Hidrologia Instanco pro tio fiksis la celon, teknike disvolvi tian tipon de akvoturoj, kiu havas:

— uzvolumenon de 3000 m^3,

— fundo-altecon de cisterno maksimume je 60 metroj,

— ferbetonan strukturon, kaj ebligas

— serian konstruadon per moderna teknologio.

La tiucelan konkurson gajnis la plano de la 2a Buroo de la Entrepreno pri Engrunda Konstru-planado, kaj la entrepreno VIZÉP estis komisiita pri la realigo; ĝi devis prepari sin por la seria konstruado, akiri la tiucelajn maŝinojn kaj fabriki la necesajn helpaparatojn. Kompreneble oni devis — per kunlaboro de ambaŭ entreprenoj — konvene ĝustigi la planojn laŭ la realigebloj de VIZÉP.

Dum tiuj projektadoj baldaŭ evidentiĝis, ke oni devas konsideri, sekve plenumi, ankaŭ pluajn postulaĵojn, kaj pro la bezonoj de la mendantoj, kaj pro la efektivaj cirkonstancoj de la konstruistoj:

— la akvoturo devas havi longan ekzisto-daŭron (80 jarojn),

— ĝi povos bezoni nur minimumajn kostojn por sia konservado kaj funkciado,

— la 3000 m^3-a cisterno, kiel akvorezerva vazo, estu nepermeabla per akvo pro sia materialo mem, sen kroma akvoizola tavolo,

— la konstruado devas ne postuli multe da laboro por la skafaldo kaj ŝelaĵo,

— la konstrulaboro estu precipe muntado, kiel eble plej sekure farebla de la laboristoj.

Tiuj kaj aliaj postulaĵoj estis ĝenerale kontentigeblaj dum la projektado kaj teknologia programado. La lev-tekniko ebligis konstrui la akvorezervujon surtere, kaj levi ĝin sur la turon nur kiam ĝi estas jam tute preta kaj akve elprovita.

La lev-tekniko prezentas apartan avantaĝon ĉe tiaspeca, alta-pezcentra establaĵo, nome, ke la fundamento ricevas sian plenan ŝarĝadon ankoraŭ ĉe malalt-pezcentra stato. Tiam la momanto de la vento, kaj de la konstrua malprecizeco (ekscentrikeco) restas ankoraŭ minimuma. Ĉar tiutempe la enpremiĝo de la grundo kaj parto de la sinko okazas pli favore, kio donas al la tura stabileco multe pli da sekureco.

La lev-instalaĵon la entrepreno aĉetis de la okcident-germana firmo DYWIDAG, kiu havas grandajn rutinon kaj sperton koncerne levadon. Tiun hidraŭlan lev-instalaĵon establis surloke tiu firmao mem, ĝi projektis ankaŭ la teknologion por la cisterno-levado, kaj ĝi instruis la fakulojn de VIZÉP munti, kaj funkciigi la instalaĵon.

Laŭ la menciitaj plurspecaj planoj estis konstruita la unua, eksperimenta akvoturo en Budapeŝto (XVIII. Lakatos str.), kies vertikalan sekcon prezentas *Fig. 1.*

La fundado de la akvoturo — pro la tiea grunda strukturo — komenciĝis per profundigitaj, izolaj pilastroj, kiujn interligas 3,5 m dika ferbetona izoltabulo. Sur tiuj staras la ferbetona trunko — kun samgrandaj sekcoj transversaj — farita per glitŝelaĵoj. En ĝia interno troviĝas la liftoŝakto kaj la ŝtuparejo, sur ĝia supro estas la ampleksa, konzola lev-platformo. La alteco de la turotrunko kaj ĝiaj internaj strukturoj varieblas laŭ la hidraŭlikaj bezonoj.

La cisterno-kaliko estas kunmetita, normala ferbetona ŝel-strukturo, kiu dividiĝas je du sendependaj cisternopartoj, de 1000 m^3, respektive 2000 m^3 volumenoj, krome je seka ejo (t.n. gutadejo), kie troviĝas la hidroteknikaj muntaĵoj kaj kondukiloj. La eksteran surfacon de la kaliko formas antaŭfabrikitaj ferbetonaj kovraĵ-elementoj, servantaj ankaŭ por la estetika aspekto de la kaliko. Ĉe la gutadejo 36, ĉe la cisternoj 72 antaŭfabrikitaj kovraĵelementoj trovis lokon; ilia lamena diko estas 5 cm, la duflanke 40 cm-jn altiĝanta ripo havas 10 cm dikon.

La alligo de la kovraĵ-elementoj okazis per libera muntado — sen subtenaĵo — al la jam preta strukturo de la trunko. Post ilia lokigo konstruiĝis per speciala interna ŝelaĵo la monolita



Fig. 1. Sekco de la kalika akvoturo



Foto 2. Alligo de la antaŭfabrikitaj kovraĵ-elementoj



Foto 3. Ŝelaĵo ĉe la cilindro-muro



Foto 4. Ŝelaĵo ĉe la konus-muro

ŝel-strukturo de la kaliko, kun normala beton-stalo kaj diversa dikeco. La tegaĵon de la kaliko konsistigas antaŭfabrikitaj elementoj.

La kaliko estis konstruita kiel aparta strukturo, sur la fundamento ĉirkaŭ la trunko, kaj en stato tute preta, akve elprovita, ĝi estis supren levita. Al la turotrunko ĝin alfiksis 18 oblikvaj, kaŝitaj ferbeton-kolonoj.

La menciita muntado bezonis tre zorgan teknologian preparadon, precipe pri la antaŭfabrikitaj kovraĵ-elementoj. Ties altir-stangoj kaj kuntenaj ŝtal-strukturoj estis elprovitaj — pro sekureco — per ŝarĝado 1,5-obla de la kalkulita maksimumo.

Dum muntado de la elementoj oni devis ebligi akcepton de eventualaj horizontalaj tanĝantaj fortoj (ventopremo, kolizio de elementoj, k.c.). Pro tio antaŭ levado de la elementoj oni instalis ŝtal-skafaldon, kiu subtenis la unuan elementon. Tiu skafaldo estis destinita por akcepti la horizontalajn fortojn kaj rezisti. Ĉirkaŭkonstruinte la elementojn, oni forigis tiun ŝtalstrukturon, kaj oni almetis la mankantajn elementojn. Tiuj antaŭfabrikitaj elementoj — servantaj ankaŭ kiel ŝelaĵo — estis fiksitaj per laŭplana precizeco (*Foto 2.*).

Ni jam menciis la postulon, ke la monolita ferbetona strukturo devas certigi per si mem — sen tegaĵo — plenan nepermeablon per akvo. Tiun postulon devis kontentigi la cisternofundo, la cilindro-muroj de 24 cm diko, kaj la konus-muro de varia diko (40-24 cm). Por fabriki tian nepermeablan betonon oni disponis pri modernaj kemiaj aldonaĵoj kaj betonfabrikoj. Restis la bezono organizi kontinuan, senpaŭzan kaj eminentan enmasonigon.

La entrepreno prilaboris tian ŝelaĵosistemon, kiu estas kontinue konstruebla samtempe kun la betonado, certiganta ankaŭ la necesan tavoldikon de 50 cm. Per kemiaĵoj malfruigante la solidiĝon de la betono, eblis inter-



Foto 5. Sur la lev-platformo de la akvoturo



Foto 6. La akvoturo dum levado

vibrigi la 50 cm-ajn tavolojn, kaj sekve, la ferbeton-strukturo konstruiĝis senpaŭze, kontinue, laŭ spirallinio.

La esenco de tiu ŝelaĵo-sistemo estis tio, ke oni metis ĉeftrabojn ĉe la cilindraj kaj konusa muroj laŭ la geometria «naskanto», kaj oni surmetis inter tiujn la duonmetron altajn ŝelaĵtabulojn. La fortojn el la betonpremo akceptis la lokitaj ĉeftraboj laŭ la naskanto, kiuj samtempe certigas la geometrian formon de la strukturo. La zorge preparita teknologio pri ŝelaĵo kaj betonado povis garantii, ke la monolita ferbeton-strukturo de la kaliko per si mem iĝis senmanke malpermeabla per akvo (*Fotoj 3. kaj 4.*).

Oni plenigis la kalikon per akvo ankoraŭ sur la fundamento, post la ekstera kolorigo ruĝa-blanka, necesa pro la flugtrafiko. Tiu akvo-provo bone pruvis la senmankan malpermeablon. Post malplenigo oni komencis la levadon de la kaliko.

La lev-instalaĵo DYWIDAG konsistas ĉefe el 72 hidraŭlaj cilindroj, unuope kapablaj levi 100 tunojn, – kaj el la koneksaj, tre fortikaj 72 levilstangoj, tute ŝraŭbkanelitaj, kun diametro 36 mm. La hidraŭlaj cilindroj duope ricevis lokon sur la lev-platformo, en tri apartaj hidraŭlaj ringoj, po 24 hidraŭlaj cilindroj. La levilstangoj estis ankritaj en la interna cilindro-muro de la gutadejo. Dum la levado 2-2 levil-ŝraŭbingoj certigis sur ĉiuj kanelitaj levilstangoj la realigitan levadon kaj la fiksadon de la ŝarĝaĵo.

La lev-instalaĵo DYWIDAG havas levkapablon ĝis 4000 tunoj je 60 m alteco. La priskribita akvoturo en Lakatos-strato surhavis kalikon de 3400 tunoj. Ĝi havis 3000 m^3 volumenon; ĝia konstruado sur la fundamento daŭris 8 monatojn; la levado mem bezonis nur 14 tagojn. La lev-instalaĵon kaj la staton de la kaliko dum la levado montras la *fotoj 5. kaj 6.*

Tiu ĉi eksperimenta akvoturo bone realigis la antaŭe fiksitajn celojn kaj sukcese kontentigis la postulaĵojn. La strukturo estas moderna kaj serie konstruebla per negranda laboro dum mallonga tempo.

Post la jam preta akvoturo en Lakatos-strato (*Foto 7.*) estas jam konstruataj tri aliaj akvoturoj (en Budapeŝto-Csepel, Kecskemét kaj Szolnok). La *Entrepreno por Akvoaferaj Konstruadoj* preparis sin por ties seria produktado, kaj pere de siaj spertoj povas jam konstrui ilin kaj enlande, kaj eksterlande.

Tradukis: Ervin *Fenyvesi*

Foto 7. La preta akvoturo (Lakatos-strato)



Ervin Monostori

Prezentas sin la Entrepreno por Fabrik- kaj Maŝinmuntado (Fina parto)

NI PLENUMAS AJNAN
MUNTLABORON JE VIA KONTENTO!
ĈU VI SERĈAS ENTREPRENANTON?
NI PETAS VIN, NE DECIDU SEN NI!

Kontaktu nian ĉefsekcion pri entreprenado de laborkomisioj.
Nia adreso:

Entrepreno de Fabrik- kaj Maŝinmuntado
Ĉefsekcio pri Komerco
Budapest VI.
Szinyei Merse u. 1.
H–1063
Telefono: 114-307, 125-696

2.1.3 Farado de debranĉigaj fitingoj

Tubforkojn de 90 gradoj oni produktas prefere per varma formado. Tiucele oni eltranĉas sur la tuba mantelo elipsoforman aperturon, tra kiu oni tiras mandrenon, supre konusan, sube cilindran. Dume oni ardigas la randon de la aperturo, kiu kuspiĝas, kaj kreas cilindrecan stumpon. Ties ekstremon oni ebenigas, bevelas, kaj alveldas la disiran tubon.

La tiel farita fitingo aŭ tubforko estas pli avantaĝa koncerne solidecon, aerodinamikon kaj veldoteknikon, ol la laŭkutime al la tranĉ-konturoj velditaj fitingoj. Disbranĉigaj T-profilaĵoj, faritaj per tia varma formado, estas aĉeteblaj sur la merkato, sed ankaŭ la muntada entrepreno povas ilin produkti. Por tio necesas t.n. *kolum-eltiriloj,* krome ardigaj bruliloj, funkciantaj per gaso (propan-butano aŭ solvita acetileno), kaj kompreneble kono de la teknologio.

El negrandaj kaj ne dikvandaj tuboj – sub nominala diametro 150 mm – la fiting-stumpon eblas krei (eltiri) per simpla, mane funkciigata, ŝraŭb-ŝafta eltirilo. Ĉe grandaj dimensioj la necese plia forto-bezonas mekanizon de tiu manipulado. La entrepreno tiucele konstruis la sekvajn maŝinojn:

KOLUM-ELTIRA APARATO
N-ro: 14
(Tipo: NH 345)

Aplikeblas ĉe mezdimensiaj tuboj. Sur framfostoj moviĝas supren-suben la kvertrabaĵo, kiu premfiksas la tubon. Sur la trabaĵo staras 2 hidraŭlaj cilindroj, kies piŝto-stangojn interligas forta tenilo. En ties mezo fiksiĝas la vertikala tirstango, subfine kun variebla tirkonuso. La oleo-distribuilo estas lokita sur la framo.

La hidraŭlajn cilindrojn ekfunkciigas mana pumpilo: la oleo fluanta en la cilindrojn levas la piŝtojn, kaj kun ili ankaŭ la tirkonuso eliĝas el la tubo. Dume oni ardigas la randon de la tuba entranĉo: ĝia temperaturo devas esti proksimume egala al la forĝa temperaturo de la materialo.

Kolum-eltira maŝino



Teknikaj datoj:

tuba diametro, mm: ϕ 159–324
diametro de la kolumo, mm: maks. 276
tuba vand-diko, mm: S = maks. 22
pleja tirforto, kN: 250
pleja labora premo, baro: 150
pleja ŝovo, mm: 400
propraj dimensioj, mm: 850x1200x900
maso, kg: 200

KOLUM-ELTIRA MAŜINO
N-ro 15
(Tipo: NH 518)

Aplikeblas ĉe grandaj tuboj. La konstruo kaj funkciado similas al la antaŭa aparato, sed ĝi havas nur unu hidraŭlan cilindron. La oleopumpado okazas permaŝine, la hidraŭla regmekanismo troviĝas aparte disde la eltirilo.

Teknidaj datoj:

tuba diametro, mm: ϕ 300–600
diametro de la kolumo, mm: maks. 480
tuba vand-diko, mm: S = maks. 25
pleja tirforto, kN: 420
pleja labora premo, baro: 150
povo de elektromotoro, kW: 7,5
elektra tensio: 3x380 V, 50 Hz
propraj dimensioj, mm:
eltirilo: 1100x1500x2980
regilo: 1550x500x1130
tuta maso, t: 2,9

ELIPSO-TRANĈA APARATO
N-ro 16
(Tipo: KL 526)

La rezulto de la kolum-eltiro grave dependas de la formo kaj mezuroj de la eltranĉaĵo sur la ĉeftubo. Ĝi estas ĉ. elipso-forma, kies grandan kaj malgrandan aksojn oni determinas pere de kalkulado aŭ mezurtabeloj de faklibroj.

La tiel konstruitan elipson oni desegnas sur maldikan folion kaj trakopias sur la tubon, poste oni permane faras la eltranĉon. Tiun longan manipuladon eblas grave mallongigi, aplikante tiun ĉi elipso-tranĉilon.

La aparaton oni metas sur la tubon kaj fiksas ĝin. Sur ĝia regmekanismo oni enigas la deziratajn mezurojn de la granda kaj malgranda aksoj; poste oni devas nur turni manradon, kaj la flamtranĉa ŝalmo de la aparato faras la eltranĉon laŭirante la ĝustan elipsokurbon. La aparato kapablas tiamaniere plenumi ĉiun ajn eltranĉon, kiu estas bezonebla por eltiroj ĉe ĉeftuboj kun maks. diametro 324 mm. Cetere, la aparato estas konstruebla ankaŭ por diametroj de 600 mm kaj pli.

Teknikaj datoj:

tuba diametro, mm: ϕ 324
vando-diko, mm: S = maks. 32
plej granda elipso, mm: 160 x 360
tranĉa rapido, m/min: 0,1 – 0,7
propraj dimensioj, mm: 350x880x630
maso, kg: 20

KOLUM-PRILABORILO
N-ro 17
(Tipo: NL 524)

La eltirita kolumo estas ankoraŭ malglata kaj falta. Pro tio oni devas antaŭ la veldado igi ĝin taŭga, krome prilabori ankaŭ la junton.

La aparato konsistas el tubfiksilo kaj iltenilo. La prilaboro okazas sur kolona metalboratoro.

Teknikaj datoj:

diametro de enigebla tubo, mm: ϕ 89–219
diametro de kolumo, mm: S = maks. 159
propraj dimensioj, mm: 320x400x335
maso, kg: 15
La aparato estas konstruebla ankaŭ por pli grandaj dimensioj.

2.1.4 Alfiksigaj aparatoj por veldado

Elementojn kaj organojn de tubkondukilo, jam pretajn por veldado, oni devas inter si ĝustigi kaj fiksi, almenaŭ dum la juntado. Nur per taŭga lok-determinado eblas certigi la preskribitan precizecon kaj la toler-postulatojn koncerne la formon de la produkto, la interrilaton, komunan akson, ortecon, ktp. de la elementoj.

Tiucele estas rekomendeblaj la sekvaj tre simplaj tubocentrigiloj, taŭgaj por la uzataj dimensioj inter 50 kaj 1000 mm.

TUBO-CENTRIGILO 1
N-ro 18
(Tipo: 551)

TUBO-CENTRIGILO 2
N-ro 19
(Tipo: 550)

TUBO-CENTRIGILO 3
N-ro 20
(Tipo: 578)

TUBO-CENTRIGILO 4
N-ro 21
(Tipo: 583)



Tubo-centrigilo 3

DUKTO-KUNIGA STABLO
N-ro 22
(Tipo: 584)

Tiu instalaĵo servas por kunmeti, alĝustigi kaj kunveldi sur ĝi la plurelementajn partojn («izometriojn»)de la tubkondukiloj. Tiujn partojn eblas do kiel antaŭfabrikitajn transporti al la definitiva loko de la muntado.

El ŝtal-profilaĵoj estas konstruita mem la stablo, sur kiu troviĝas tub-apogiloj: tiujn eblas levi, mallevi, ruli sur radoj, kaj sur la stablo laŭdezire fiksi kie kaj kiel ajn. Sur tiuj apogiloj ricevas lokon la kunveldendaj duktoelementoj, tie oni faras la veldadon kaj aliajn traktadojn.

En la antaŭfabrikejo aŭ uzino eblas samtempe plurajn utiligi el tiuj kunigaj stabloj, kunmetante ilin en ajna pozicio, adaptiĝante al la formo kaj amplekso de la antaŭfabrikenda dukto.

Teknikaj datoj:

amplekso, mm: 1600 x 4160
tuba diametro, mm: ϕ 76 – 560
tubmeza alteco de la grundo, mm: 790–1180
nombro de la tub-apogiloj sur la stablo: 12
ŝarĝadkapablo de unu tub-apogilo, kN: 5
vertikala ĝustigeblo de tub-apogilo, mm: 0–180
maso, kg: 530

2.1.5 Turniloj por la veldado

Ili taŭgas por turni la laborpecon (tubo, cisterno) per ŝanĝebla rapido dum veldado. Tiel ŝpareblas certaj kromtempoj, la veldista laboro iĝas pli agrabla kaj sekura, eblas eĉ la duonaŭtomata veldado. Per la maŝina turnado oni facile metas la laborpecon en la necesan pozicion, sekve plifaciliĝas krom la veldado ankaŭ aliaj manipuloj de la muntado.

TUBTURNA APARATO
N-ro 23
(Tipo: UC 421 M, UC 422 M)

La aparato konsistas el turn-mekanismo kaj el 2 apogaj rulparoj, sur komuna ŝtalframo. En la turnilo la tubo apogas sin sur 2x2 kaŭĉukizitaj rulparoj: ili estas la funkciigaj ruloj, turneblaj per regulebla rapido. Desupre la tubon alpremas kunturna – libermova – rulgrupo.

La aparato estas uzebla ĉe veldado, flamtranĉado, dispecigo, ankaŭ ĉe bevelado de tubofino. Oni konstruis ĝin en du variantoj, por du dimensiaroj.

Teknikaj datoj:	**UC 421 M**	**UC 422 M**
tuba diametro, mm: nom. diam.	80 – 300	300 – 600
periferia rapido, cm/min:	6 – 60	
povo de elektromotoro, kW:	0,75	
ŝarĝadkapablo, kN:	600	
propraj dimensioj, mm:	8032x1070x900	8032x1445x900
maso, kg:	400	600

CISTERNOTURNA APARATO
N-ro 24
(Tipo: TF 286 M)

Ĝi taŭgas por maŝina turno de grand-diametraj cilindraj laborpecoj per regulebla rapido. Unu kompleto konsistas el funkciiga parto kaj laŭplaĉa nombro (min. 3) da libermovaj apogiloj. Ambaŭ unuoj havas 2 parojn da kaŭĉukizitaj rulgrupoj. Tiuj moveblas ĉirkaŭ fiksa akso, «memĝustiĝas»: pro pezpremo de la surmetita laborpeco ili ekmoviĝas kaj sur kvar punktoj sekure subapogas ĝin.

Oni metas 2-2 rulgrupojn el la funkciigaj kaj kunturnaj sur komunan bazframon; laŭ dimensioj de la laborpeco oni aldonas pluajn da ili. Unu baza kompleto konsistas el du bazframoj, unu funkciiga kaj tri kunturnaj rulgrupoj.

Teknikaj datoj:

diametro de laborpeco, mm: 400 – 3000
turna rapido, mm/min: 100–700
ŝarĝadkapablo de unu rulgrupo, kN: 50 (5 t)
ŝarĝadkapablo de baza kompleto (4 rulgrupoj), kN: 200 (20 t)
povo de elektromotoro, kW: 0,7
elektra tensio: 220 V, 50 Hz
propraj dimensioj, mm:
funkciiga rulgrupo: 860x2500x794
kunturna rulgrupo: 350x1730x794
bazframo: 4000x1400x180

maso, kg:	funkciiga rulgrupo:	700
	kunturna rulgrupo:	500
	bazframo:	350

Krom la supre menciita, la entrepreno disponas ankaŭ pri aliaj, pli grandaj tipoj; tiuj akceptas laborpecon kun dia-

metro 400 – 4000, resp. 1000 – 5000 mm, kaj ŝarĝon po 15, resp. 25 t sur la rulgrupoj.



Cisternoturna aparato

2.1.6 Aparatoj por tub-kunigoj

TUBA HELICTAJLATORO
N-ro 25
(Tipo: KM 334)

Per tiu maŝino eblas sur tubojn tranĉi helicajn kanelojn de 1 : 16 konuseco, laŭ Hungara Standardo MSZ 7815.

Al ĉiu kaneldimensio apartenas helic-tranĉilaro el 4 kombil-tranĉiloj kaj gvid-ĉuko. La maŝino konsistas el du ĉefpartoj: helic-tranĉanto kaj movmekanismo. Oni fiksas ĝin sur stablon por uzo.

Teknikaj datoj:

Tranĉeblaj helicoj: KC 1/4", 3/8", 1/2", 3/4', 11/4", 11/2", 2"
longo de helico, mm: maks. 25
mezvaloro de turna rapido, m/min: 1,5–2
rapidumoj: 3
povo de elektromotoro, kW: 1,1
elektra tensio: 3x380 V, 50 Hz
propraj dimensioj, mm: 300x490x960
maso, kg: 90

RANDAĴFALDA MAŜINO
N-ro 26
(Tipo: E 92)

Kiam oni muntas tubojn de kemiaj, aerteknikaj, k.a. instalaĵoj, ofte venas bezono por fari kunligojn per flanĝoj aŭ randaĵoj, el ŝtallato aŭ aliprofilaj (L,I,U) ŝtaloj.

La randaĵfalda maŝino per malvarma formado produktas inter tri rotaciantaj cilindroj arksegmentojn aŭ tutajn randaĵojn. La manipulo tiamaniere estas pli rapida kaj malkara, ol per la ĝis nun uzitaj metodoj (varma formado, forĝado).

Teknikaj datoj:

plej grandaj lamineblaj profildimensioj, mm:
ŝtal-lato: 120 x 15
L-profilaĵo: 60 x 60 x 8
I-profilaĵo: 120
U-profilaĵo: 100
plej malgranda lamina diametro, mm: ĉ. 400
rapido de laminado, m/min: 7,2
povo de elektromotoro, kW: 2,2
elektra tensio: 3 x 380 V, 50 Hz
propraj dimensioj, mm: 1140 x 1630 x 1700
maso, t: 1,5



Randaĵfalda maŝino

MOMANT-ŜLOSILO 1
N-ro 27
(Tipo: NY 168)

Ĉe flanĝaj aŭ alispecaj ŝraŭbaj tub-kunigoj de tubkondukiloj, cisternoj, kemiaj aparatoj ofte necesas turni kaj streĉi la ŝraŭbojn per konata, preskribita momanto.

Per tiu ĉi momant-ŝlosilo la manipulo estas plenumebla simple, rapide kaj per konvena precizeco. La grando de la aplikita momanto estas cifere indikata (en Nm = Neŭton-metro) sur la skalo de la surŝlosila dinamometro. Por la divers-dimensiaj ŝraŭbingoj oni aplikas ŝanĝeblajn tub-ŝlosilojn.

Teknikaj datoj:

mezurebla, resp. aplikebla momanto, Nm: 100 – 2500
dimensioj de turneblaj ŝraŭboj: M 24 – M 64
propraj dimensioj, mm: 110 x 160 x 1100
maso, kg: ĉ. 14

MOMANT-ŜLOSILO 2
N-ro 28
(Tipo: HK 401)

Tiu ŝraŭbŝlosilo kapablas apliki grandajn momantojn por streĉi ŝraŭbojn de grandaj flanĝoj. Dum ĝi streĉas unu ŝraŭbon, la aparato apogas sin sur du najbaraj ŝraŭboj, resp. ŝraŭbringoj. La ŝraŭbturnilon movas piŝto-stango de hidraŭla cilindro. La cilindron oni funkciigas de hidraŭla akumulilo per mana pumpilo. La divers-dimensiajn ŝraŭbingojn oni same turnas pere de ŝanĝeblaj stel-ŝlosiloj.

Teknikaj datoj:

momanto, Nm: 200 – 20 000
turbeblaj ŝraŭboj: M 45 – M 100

2.1.7 Iloj de premprovado

PROVATORO DE MUNTAĴO
N-ro 29
(Tipo: SZP 124 A)

Tiu instalaĵo ebligas elprovadon de tubmuntaĵoj kun flanĝaj kunligoj (kranoj, rigliloj, valvoj) pri premrezisto kaj likimuneco antaŭ la pretmuntado. Samtempe du muntaĵoj estas elproveblaj. La prova likvaĵo estas akvo aŭ petrolo, kiun fluigi kaj akiri la bezonatan provpremon, oni devas uzi pumpilon de taŭga finpremo.

Teknikaj datoj:

limoj de provpremo, baro: 2,5 – 300
dimensioj de proveblaj muntaĵoj, mm: nom. diam. 15 – 300
nominala premo de proveblaj muntaĵoj, baro: 2,5 – 250
propraj dimensioj, mm: 812 x 1400 x 1900
plej granda alteco de proveblaj muntaĵoj, mm: 850
maso, kg: 670

ĜUSTIGATORO DE SEKURIGA VALVO
N-ro 30
(Tipo: BP 309/A)

La instalaĵo konvenas por ĝustigi sekurigajn valvojn de tubkondukiloj, prem-cisternoj, kaldronoj, funkciantaj ĉu de risorta, ĉu de peza forto. Ĉefaj partoj: rondforma stablo sur tubpiedoj, fiksigilo, aerkondensilo, cirkvitoregilo kaj sekurigaj muntaĵoj. La uzata likvaĵo estas industria nitrogeno, fluigenda el 41 litra gasbotelo kun premo de 150 baroj.

Teknikaj datoj:

dimensioj de proveblaj, resp. ĝustigeblaj sekurigaj valvoj, mm: nom. diam. 15 – 200
premo, baroj: 0 – 40
propraj dimensioj, mm: ϕ 800 x 900
maso, kg: 400

TUBFINO-FERMILOJ POR PREMPROVO
N-ro 31
(Tipoj: 790 – 825)

Aparatoj taŭgaj por fermi cilindrajn tubfinojn sub tubkondukiloj kaj cisternoj. La fermo okazas provizore, nur por la premprovo. Ili estas aplikeblaj kaj ĉe krudaj, kaj ĉe aŭstenitaj ŝtaloj. La hermetan fermon certigas deformiĝo de mekanike streĉita, elasta ferma elemento. La aparatoj por ĉiuj dimensioj estas produktataj en tri specoj:

- simpla tubfino-fermilo,
- tubfino-fermilo kun aerforigilo,
- tubfino-fermilo kun aerforigilo kaj manometra konektilo.

Teknikaj datoj:

aplikeblaj tubaj diametroj, mm: 25 – 273
vando-diko de la fermeblaj tuboj, mm: 2,5 – 11
pleja ferma premo, baro: 10
propraj dimensioj kaj maso varias depende de la tubo-dimendimensioj.

La entrepreno produktas ankaŭ aparatojn por hermete fermi konusajn tub-stumpojn kaj tub-malvastigaĵojn.

PREMPROVAD-PUMPILOJ
N-ro 32
(Tipoj: SZ 546
SZ 298 A
SZ 228 A)

La provad-pumpiloj, disvolvitaj kaj uzataj de la entrepreno, taŭgas por apliki la bezonatan premon ĉe premprovoj de tubkondukiloj kaj cisternoj. Ili estas ekipitaj per la necesaj muntaĵoj por flu-direktado kaj sekurigo. La aparatoj estas ruleblaj sur radoj, rapide transigeblaj, facile treneblaj.

Pro la relative malgranda liverkapablo, ili estas apenaŭ oportunaj por plenigi per akvo tre ampleksajn instalaĵojn, prefere nur por plenumi la provpremon. Maŝine laborantaj, la tri-cilindran piŝtan pumpilon funkciigas elektromotoro.

Premprovad-pumpilo

Teknikaj datoj:

	SZ 546	*SZ 298A*	*SZ 228A*
plej granda premo, baro:	35	200	400
liverkapablo, l/min:	60	8	4
povo de elektromotoro, kW:		5,5	
elektra tensio:		3 x 380 V, 50 Hz	
ĉefaj dimensioj, mm:	900x880x1100	985x510x900	985x510x900
maso, kg:	280	260	260

3. La estimata leganto verŝajne rimarkis, ke ni informis pri granda aro da novtipaj kaj tre utilaj laboriloj. Probable ankaŭ en via agadsfero troveblas laborprocedoj, ĉe kiuj bonvene estus utiligeblaj kelkaj el niaj praktikcele disvolvitaj aparatoj! Ni volonte staras je via dispono ankaŭ per teknikaj informoj — uzu do la eblecon!

Tradukis: Ervin *Fenyvesi*

ENTREPRENO POR FABRIK- KAJ MAŜINMUNTADO
TEKNIKA DIREKCIO
BUDAPEST VI.
PAULAY EDE U. 52.
H–1061
Telefono: 217–720

Unueco estas forto

Konstrui Novan Ponton. Kolora bildlibro por infanoj. Adaptita de Wan Yun, pentrita de Chen Yongzhen. Eldonis: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1982. 18,5 cm, 40 paĝoj (nenumeritaj). Prezo: 0,22 britaj pundoj. (Por Hungario: 14,- forintoj)

Apud rivereto vivis kvar amikoj: sprita sciureto, vigla leporeto, forta ĉimpanzo kaj cerbumema elefanto. Kaj okazis, ke la torento rompis la lignan ponton, kiun ili uzis por transiri la rivereton. La kvar amikoj rapide decidis rekonstrui la ponton, sed tiam intervenis la ruza vulpo, konsilante al la ĉimpanzo eltiri sin el la komuna laboro. Sed fine venkis la prudento, kaj la nova ponto pretiĝis, kaj la kvar amikoj malkovris, kiel granda forto kaŝas sin en la unueco.

La ĉarman kaj pedagogie utilan fabeleton akompanas rave belaj ilustraĵoj, kiuj plenigas almenaŭ tri kvaronojn de ĉiu paĝo. Libreto eminente uzebla en lernejaj kursoj, sed agrabla kaj okulkaresa legaĵo ankaŭ por plenkreskuloj.

V. *Benczik*

Sukcesa libreto pri gramatiko

Gramatika demandaro resuma. Kompilis: Julio Baghy. Hungara Esperanto-Asocio, 1982. 40 p.

La fakto, ke la libreto aperas la kvaran fojon, atestas pri granda populareco. Ĝi estas tre utila referencaro por kurslernantoj kaj meritas esti vaste uzata en la tuta Esperantujo.

La katehisma prezentmaniero estas tre oportuna — 50 demandoj kun mallongaj respondoj. Serĉon de bezonataj detaloj faciligas du gramatikaj indeksoj: Esperanta—hungara kaj hungara—Esperanta.

La verko koncize kaj klare traktas bazajn demandojn de la gramatiko de Esperanto el la tradicia vidpunkto.

Aparte trafe estas pritraktitaj la vortkunmetado laŭ la teorio de K. Kalocsay, kaj la predikativo. Originalaj, utilaj kaj klaraj estas la tabeloj de la strukturaj frazelementoj kaj de la akcesoraj komplementoj.

Kelkaj eroj estas tamen kontesteblaj:

— Apud la aserto, ke Esperanto estas fonetika lingvo, troviĝas inter la konsonantoj: dz, nj.

— La proprajn nomojn estas rekomendate skribi laŭ la ortografio de la origina lingvo. Estus utile rekomendi, ke ĉe la unuafoja renkontiĝo de la propra nomo oni indiku en parentezaj ĝian proksimuman prononcon per Esperantaj literoj. Ekzemple, pro neuzo de tiu ĉi procedo plejparto de la propraj nomoj en «Trigroŝa romano» estas tute neprononceblaj.

— Ne plu estas vera la aserto, ke la gramatikan karakteron de la vortradikoj oni trovas aŭtentike (!) en la plena vortaro de Esperanto. Fakte, nun oni trovas ĝin nur en «Baza Radikaro Oficiala», kiu dume, bedaŭrinde, ne estas sufiĉe atentata.

— La klarigon pri la principo de neceso kaj sufiĉo estus utile daŭrigi per ekzemploj de senafiksa derivado («ĉu *necesas,* ke ni *piedu* aŭ *aŭtobusu?* »)

Kelkaj pritraktindaj detaloj restis en ombro, ekzemple:

— La adjektivo kutime troviĝas antaŭ la substantivo. La postsubstantiva pozicio estas uzata por emfazo.

— Se antaŭ la substantivo troviĝas adjektivo, la artikolo antaŭas la adjektivon.

— Ekzistas aro da verboj kun necerta transitiveco (danki iun kaj danki al iu, partopreni ion aŭ en io).

— La adverbo povas havi formon de akuzativo de direkto (hejmen, teatren).

Krome, elvokas dubon neceso de mencio de kelkaj sufiksoj, kiuj estas ne nur neoficialaj, sed ankaŭ tre malofte uzataj: *-iko, -ito, -eska, -iva, -oida, -oza, -izi.*

La libro estas rekomendinda por prepariĝo al ekzamenoj, ne nur pri elementa kurso.

Boris *Kolker*

Sukceso ĉe kibernetikistoj

Kibernetiko de la homa lingvo kaj aliaj aktoj de la IX-a Internacia Kongreso de Kibernetiko. Kompilitaj laŭ komisio de la Association Internationale de Cybernétique (Namur) far d-ro Helmar Frank, Yashovardhan, Reinhard Cziske — Institut für Kybernetik Berlin und Paderborn. Eldonis Hungara Esperanto-Asocio, Instituto pri Kibernetiko. Budapest — Paderborn, 1982. 192 p. Prezo: 15,- ned. gld.

Kibernetiko estas nova ekspansiema scienco, kiu, ŝajne, emas engluti ĉiujn aliajn sciencojn aŭ almenaŭ helpi ilin. Feliĉe, tiu ekspansiemo manifestiĝas ankaŭ en Esperantujo.

Kompreneble, Esperanto posedas unuavice emocian altiron. Sed ne malpli gravas la praktika apliko (precipe en la scienco), por kiu ja la lingvo estis kreita. Sed ni staras antaŭ la sorĉita cirklo: sciencistoj volonte studus Esperanton, se ili trovus en ĝi abundan fakan literaturon, eldonistoj volonte publikigus sciencajn librojn en Esperanto, se tiuj havus multajn legantojn. Ĉu ekzistas eliro? Jes, kvankam tre komplika: konscio, kuraĝo kaj persisto de iniciatintoj el ambaŭ kategorioj, subtenataj de la esperantlingva komunumo.

Kiam lastatempe ni parolas pri la sukcesoj de Esperanto, ni emfazas, ke la Internacia Kongreso de Kibernetiko akceptis ĝin kiel trian laborlingvon (nu, dume provizore). Tio impresas homojn de ĉiuj sciencoj. Kaj jen la materia pruvo: la prezentita libro.

Ĝi enhavas tekstojn de pli ol dudek prelegoj, grupigitaj en jenaj ĉapitroj: mezurado de teksta *informacio* (jen la ĝusta vorto!), kibernetika transferteorio kaj lingvopedagogio, aŭtomata prilaborado de lingvo, juraj kaj lingvistikaj problemoj, principoj de la kibernetiko kaj ĝenerala teorio de sistemoj, la kibernetiko en la prihomaj sciencoj, la kibernetiko en la inĝenieraj sciencoj, biokibernetiko kaj kibernetika medicino.

Inter la aŭtoroj ni notu almenaŭ la jam bone konatajn: H. Frank, G. Lobin, B.A. Sherwood, H.D. Maas, I. Lapenna, F. Pennacchietti, A. Sakaguchi, B. Popoviĉ, P. Neergaard, W. de Smet. Tiu tranombrado tute ne signifas, ke alies prelegoj estas malpli valoraj. Espereble, ankaŭ iliaj nomoj baldaŭ fariĝos bone konataj.

Skribi pri la enhavo ne eblas pro specifeco kaj varieco de la pritraktataj temoj. Sed, certe, la nivelo estas inda je internacia kongreso. Akiru kaj legu la libron kaj vi nepre trovos ion laŭ via plaĉo.

Boris *Kolker*

GAJA PAĜO

MOTO: kiu komencas gaje, eble finos plore.
Konkludo: ni komencu plore, por fini glore.

Kompatinda verkisto

— Terure! Mia trijara filo ĵetis en la fornon preskaŭ du ĉapitrojn el mia ankoraŭ ne preta romano...
— Surprize! Ĉu via fileto jam scipovas legi?

Kompatinda edzino

— Imagu, nia najbarino havas la saman kostumon kian mi havas! Kion fari?
— Decidu, karulineto: ĉu aĉeti alian, aŭ ni trovu alian loĝejon?

Kompatinda edzo

— Kara doktoro, mi plurfoje rimarkis, ke mia edzo nokte parolas dum dormo. Kiel kuraci tiun malordon?
— Nenio pli facilas, sinjorino! Permesu al li paroli dumtage!

Kompatinda ĉiĉerono

La turistoj jam ĝistede ĉikanis senĉese la ŝajne ne elĉerpeblan scion de ilia ĉirkaŭĉirpita ĉiĉerono. Ĉinĉilaĉapa ĉarmulino scivolemas ankoraŭ plu: — Kaj tiu monto kiom pezas probable?
— Depende! — prononcas la ĉiĉerono — ĉu vi deziras kun arboj aŭ sen ili?

Ne kompatinda ulo

— Bonvolu montri la legitimilon! — alparolas policano la gaston en «bonfama» drinkejo.
— Plenvolonte, jen! Mi povas prezenti ankaŭ pri aliaj nomoj...

Ĉu kompatinda aŭtisto?

Interdente krakas la riparisto: — Diable, kiel ja povis krevi tiel aĉege tiu ĉi pneŭo?
— Mi surtretis per mia aŭto vinbotelon frumatene...
— Kaj ĉu vi ne rimarkis ĝin sur la vojo?
— Tute ne... la botelo enestis en poŝo de *viro!*

Impertinento!

— Donu prunte vian loĝejon, amiko! Nur por unu horo! Sed voku ankaŭ iun ĉarmulinon, kiu tien venos kune kun mi.

Taŭga loko

— Kara kolego, vi havas sufiĉe antipatian aspekton. Do, estos vi, kiu redonos la rifuzitajn petskribojn al la publiko!

Vana konsilo

Manĝu pli da fiŝo — konsilis la kuracisto al drinkulo — ĝi helpos, ĉar ĝi enhavas fosforon!
— Sed kara doktoro — rifuzis la paciento —, mi volas iĝi bonfarta, kaj ne nokte lumiganta...

Sukcesa puno

— Ĉu vi jam havas ian programon aŭ planon por la unua tago, kiam vi liberiĝos? — demandas la malliberejestro.
— Eĉ du planojn mi havas, sinjoro direktoro! Unu bankon kaj unu juvelejon...

Trafi misŝancon

— Monon! aŭ vivon! — kriis la bandito.
— Prenu mian vivon. La monon mi ŝparas por mia maljunaĝo...

Aŭgurado?

— Bonvolu prunti al mi 20 kronojn!
— Volonte. Sed kiam vi redonos ilin?
— Kia demando? Ĉu por bagatela dudeko mi eĉ diru aŭguron al vi? !

Ne ĉiam taŭga loko

— Estas terura tiu ĉi tajpilo — plendas tajpistino al kolegino.
— Kial? Oni ĵus ĝustigis ĝin...
— Nu, ĝi estas ja bone laborebla. Sed kiam mi ne laboras, ĝi tuj aŭdiĝas...

Taŭga aĵo

— Sinjoro reĝisoro, mi atendas vian viziton — petegas la sekreta aŭtoro. — El miaj dramverkoj mi gardas hejme kvin grandiozajn jam de 30 jaroj en mia ŝatata malnova skribotablo. Eble por la Festivalo de Esperanto-Teatroj iu interesos vin, ĉu?
— Certe. La malnova skribotablo.

Kiom enviinda amo

— Rigardu, kiel arde amas tiu viro la edzinon! — atentigas iom dezireme edzineto, montranta al la televidilo.
— Sed ĉu vi scias, *kiom* li ricevas pro tio? — murmuras mediteme ŝia edzo.

Ne enviindaj amikinoj

— Sufiĉas rigardi en okulojn de la viro, kaj mi jam scias, kion li pensas pri mi — fieras la damo al sia amikino.
— Oh, kiel mi bedaŭras vin, mia kara...

E.F.

Diskuto kun Babelo

Ni citas el samtitola poemo de hungara poeto Géza *Hegedűs.* (La poemo havas subtitolon: «Al miaj esperantistaj amikoj.») Jen la citaĵo: «Babel'! Multlingveco, magisto mava, / vi nutras la fajron de suspekt' malprava,/ ke alilingvano estas malamiko...» — La finajn versojn vidu en la linioj: **H.1., H.29., V.60., H.88. kaj V.38.**
Limdato: unu monato post la alveno de la revuo. (Inter la solvintoj ni lotumos premiojn.)

Horizontale: 15. Centra parto de cirko **16.** Submetiĝas, cedas **17.** Manko de io **18.** Surpriziĝo kaŭzas **19.** IK **20.** Femalan **22.** Biblia persono, pri kiu oni nomis masturbon **23.** AGN **24.** Longa dika ligno (R) **26.** Organo de vido (R) **28.** Faru ion **31.** Malpli larĝa ol ortangulo (R) **33.** Mira interjekcio senĉapela **34.** Rehavigus **36.** Afrika dezerto **38.** Loĝanto de Eŭropa lando (R) **40.** Interjekcio esprimanta abomenon **41.** Viret' **43.** Speco de kolbas' **44.** Rapida, forta ekmovo (R) **46.** Verba finaĵo **48.** ...eo: peco de presita teksto **50.** Malpermesa vorto **51.** Bulbon **53.** Uzas Eskiman boaton **56.** Juvelŝtono (R) **57.** Malbonan antaŭsignon **59.** Promesita malbono **61.** Reen: preparita besta haŭt' **62.** Granda metalvazo, ekz. por kuiri (R) **64.** Ŝafo el Iberia raso (R) **66.** Malgranda (R) **68.** Legom' el fam. liliacoj **69.** Meza parto de persono! **71.** Germana esperantologo **72.** Korpa ekzerco (R) **75.** Loĝejo por birdoj (R) **77.** Prepozicio **79.** Lirika poemo **80.** Malfunkciis pro akcidento, difektiĝis **82.** Zorge ĉirkaŭrigardis **85.** Valormetalo (R) **86.** Okcidenta soldata organizo (mallongigo) **91.** Fino de ĉielarko! **93.** Hundsimila rabobesto **95.** Merita **96.** Io estos far... (iam) **97.** Filo de filo **99.** Malbrile blanka **101.** Tabelvorto aŭ: amatino de Zeŭso **102.** Detranĉita longa branĉ' **103.** Araba lando **105.** Koncernanta gravan industrion **107.** Libertempa.

Vertikale: 1. Ŝnura reto, kiel pendigita lito (R) **3.** Instruiĝu! **4.** Femalo **5.** Ne — angle **6.** Ekzemple: a, e, i **7.** Siberia rivereg' **8.** Malaserti, rifuzi **9.** Akva vegetaĵo **10.** Japania havenurbo **11.** Unuiĝintaj Nacioj **12.** ...-no: kemia elemento, gaso **13.** Virina nomo **14.** Akvofalo en Usono **19.** Malmola, malofta metalo **21.** Oleeca frukto (R) **24.** Unu el la kvar koloroj de ludkartoj (R) **25.** Moninstitut' **27.** Uzas ion kontraŭ pago **30.** PR, Fama hungara historia pentristo (THAN) **35.** Kiel H.43. **37.** Metaforo en artoj **39.** Franca imperiestro **42.** Virina bankostumo **45.** Vorto por aparte signi iun (R) **47.** Tuton de disĉiploj **49.** Malgrandulo (R) **52.** Nea konjunkcio **54.** Virina nomo **55.** Identa (R) **58.** Speco de brasiko (R) **63.** Daŭre esti en sama loko **65.** Grava branĉo de la ekonomio **67.** Pene tiri post si (R) **70.** Taŭga procedaro por plej bone efiki **73.** Scii laŭvorte, do... **74.** Pro tia kaŭzo **76.** Enuigi **78.** Kiso estas tia **81.** Linorestaĵo por ŝtopi (R) **83.** En nenia tempo **84.** Kondiĉe... **87.** Netravidebla **89.** Reen: posteulo de reĝo, Edipo **90.** Reen: turka oficiro iam **92.** Reen: legomo kun dika manĝebla radiko **94.** Rusa virnomo **98.** Sekvas la sepan **100.** Vasta salakvo mikse (R) **102.** Plendkrii **103.** Kompara konjunkcio **106.** Nedifina adjektivo **107.** Konsonantoj de bildo

Solvo de la krucenigmo en n-ro 1983/3:

Kvankam malsaĝ' de homo ĝin subminas,
Abundas, daŭras vivo kaj obstinas. (Rejna de Jong)

Libropremion gajnis per lotumado: J.V. *Haering,* Štěchovice, CS; *Stepanov* S.V., Nikolajev, SU; *Tóth* Imre, Hajdúnánás, H.



Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Georgi Mihalkov

Baza literatura krestomatio
Redaktis: Vilmos Benczik

«Baza literatura krestomatio» ankoraŭfoje pruvas, ke Esperanto-literaturo estas jam sufiĉe riĉa kaj multkolora. Per tiu ĉi antologio la legantoj povas konatiĝi kun la plej bonaj specimenoj de nia originala kaj tradukita literaturo.

1. En kiu vilaĝo vivis Gavrilo Gavrilovič R., la heroo de la rakonto «La Neĝa Blovado»?
2. Kiel nomiĝis la skribisto en la romanfragmento de «La Faraono»?
3. Kiu verko komenciĝas per la vortoj:
«Saluton, masonisto, mia prapatro Ruben.»?

Limdato por la respondoj: du monatoj post la alveno de la revuo.

Solvoj de la demandoj en la n-ro 1983/3:

1. La Sinjoro diris al Diofilo Kara: «Fosu al vi sulkon el fideleco kaj obstino.» 2. Andreo Apud ekiris el la lando rumana. 3. Kalsurmano Galoŝej diris la vortojn:

«Sinjoro! Sinjoro!
Kiel Streĉita Kordo estas mia koro
Kaj mi estas trista.»

Libropremion gajnis: S-ino Roma *Thorsen,* Kopenhago, DK; Leon *Zimels,* Ternopol, SU. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

Korespondi deziras

Uwe *Werner* (19) studento pri interpretado, kun ties spertulo, por kritike apogi lin, ankaŭ pri E, k.c. temoj. Steinsgraben 29, *Zeitz,* DDR-4900. — *Maroccia* Anna (16), ktm, pri danco, muziko, k.c. *Milano,* Corso Cristoforo Colombo 6, I-20100. — F-ino *Sammatrice* Carla (15) kun gejunuloj, *Milano,* Via Sibelius 16, I-20100. — *Violetta* Maria Elena (16) pri sporto, danco, muziko. *Milano,* Via dell' Aprica 2, I-20100. — S-ro *Takemori* hirotoŝi (22) studento, ktm, pĉt, C/o Shisei-tyo C-5, Oonoshiba-cho 23, *Oosaka,* J-593. — F-ino *Shimazu* mina (20) studentino, kun gejunuloj, el tm, pĉt. *Oosaka,* J-546, 1-15-21 Nishiimagawa, Higaŝisumiyoŝi-ku. — S-ro *Ŝiba* tooru (22) studento ktm, pĉt. 20-3 Kita-aobadai, Kauaĉinagani-ŝi, *Oosaka,* J-586. — S-ro *Takeuchi* yoŝitaka (19) studento, kun junulino el Francio, Aŭstrio k.a., pri div. temoj. C/o s-ro Suzuki, 1-12-1 Sakura-maĉi, Setsu, *Oosaka,* J-564. — F-ino *Sakai* yukiko (21) studentino, ktm, el germanaj landoj, k.a. pĉt. 2-5-9 Hiranohigaŝi, Hirano-ku, *Oosaka,* J-547. — F-ino *Kotake* atsumi (19) studentino, el Italio, germ. 1. k.a. pĉt. C/o s-ro Kawaŝima, 337 Niŝi-maĉi, Hikiŝo, *Sakai-ŝi* J-591. — S-ro Krupa *Zoziseaw* (36) instruisto de sportedukado, pri turismo, foto, sporto, kol. pm, monerojn, ktm, pĉt. Respondo certa. *Babimost,* ul. 22. Lipca 3/11. PL-66-110. — F-ino *Volpe* Patrizia (17) pri danco, sporto, kun gejunuloj. *Milano,* Via Binola 36, I-20100. — S-ro *Kaneko* osamu (20) studento kun junulinoj el Hisp., Francio k.a. pĉt. 1404-32 Sakasai, Kaŝiua-ŝi, *Ĉiba,* J-277. — S-ro *Tando* kacuhiko (23) studento, ktm. gejunuloj (ĉ. 20) pĉt. 2-14-5 Terao kamata, Ayase-ŝi, *Kanagaua,* J-252. — S-ro *Fukuma* toŝiyuki (19) studento, kun junulino ktm, pĉt. C/o Tsuji Mitsuko, 2-2-15 Senriyamahagaŝi, Suita-ŝi, *Oosaka,* J-565. — F-ino *Rut* Dorota (25) ktm. pri literaturo, turismo, foto, diapoz. kaj moderna muziko, interŝ. bk, diapoz., tur. prospekt:oj. — Artisto Vytas *Matjošitis* pri arto, muziko kun H, I, Aŭstrio, Japanio, Usono, kol. pm, bk. *Raseiniai,* Pergalés 51, Litovio-SU-234400. — Studentino Zofia *Grzelak* (25) pri libroj, kino, teatro, lingvoj, kol. bk. *Wiazowna,* Radiowek 15, Skrytka Pcztowa 53, PL-05462. — F-ino Maria *Kiss* (16) kemia studentino ŝatas muzikon, sporton, naturon, kun 15-18 jaraj gejunuloj. *Pécs,* Kodály Zoltán út 20/a, H-7601. — S-ro Gintaras *Ziaunys* (18) pri muziko, k.a., interŝ. pm, pk, ktm. resp. garantiata. Litovio, SU-235.00, *Mažeikiai* Žemaitijos 9-25. — *Bartaŝeviĉiŭté* Regina (26) edukistino de infanvartejo, ktm. Litovio, SU-234.900, *Saldutiŝkio,* Vaiky Darželis. — F-ino E.J. *Viburyté* (24) instruistino, ktm, pĉt. Litovio, SU-234.911 *Tauragnai.* — S-ro Oleg *Baev* (27) instruisto de germana, pĉt, *Perm,* ul. Mira, dom. 66, kv. 10. SU-614.066. — !nĝ. Maria *Zyromska* (27) ktm, pri literaturo, turismo, rec. gastigado, interŝ. bk, diapoz. mod-revuoj. *Wroclaw,* str. Budziszynska 130 m11, PL. — S-ino *Blagovesta Raikova* (29) ktm, pĉt, interŝ. pm, poŝkalend., buŝtukojn, modelojn punti, recipr. gastigado eblas. *Gabrovo,* str. Petar Mihov 31. ap. 3. BG-5300. — S-ro Henry *Schauer* (38) ŝatas korespondi, foto, pejzaĝaj bk. *Weissbach,* Hermannsdorfer Str. 64, DDR-9535. — S-ro *Kovnators* Naumo (25) E-instruisto, pri historio, literaturo, arto, kulinaraĵoj, viraj kutimoj, popolkostumoj. Kol. bk de naturo, urboj. *Aluksne* Omskas 16-2, Latvio, SU-228.730. — S-ro TS. *Batzaya* (18) laboristo pri la Esperanto-movado en la mondo, *Ulan-Bator,* Post restante Popola Respubliko Mongolio.

LETERKESTO

Mirdza Burgmeister, Riga, SU-Latvio: Nia rapidkurso: «Gustumu la hungaran!» estis nur eta gustumaĵo. Se tiu modesta intenco iomete akceptiĝis ĉe niaj legantoj, tio kontentigas nin. Eble ne sole vi, ankaŭ aliaj legantoj uzas tiun «kurson» por plezure ekkoni jen la elparolon de la ekkonataj hungaraj nomoj, jen enrigardi en la specialaĵojn de tiu ne-Hindoeŭropa lingvo. — Pro foto de la plakaĵo pri *Bartók Béla,* fare de latva skulptisto-esperantisto *Janis Strupulis,* akceptu dankon. Nia revuo plurfoje raportis pri hungaraj artistoj-esperantistoj.

Székely Csaba, Pécs, N: Ni konsentas: «efekto» estas uzinda sole por spiritaj impresoj, sed ne okaze de efikoj sur materion. Certe inter tiuj flankoj meze troviĝis la efiko «nervojn trankviliga», k.s. lokoj, kio parte klarigas la tradukistan uz-gliton al «efekto». Pro la atenta legado dankas la tradukinto.

Magnus Weisflog, Scheibenberg, FRG: Ofte ni publikigis admonajn artikolojn, unuavice pro malŝato kaj naŭzo kontraŭ la mediaj damaĝoj, kaŭze de neglekte uzita tekniko. Nia fidela leganto nun memorigis nin pri neniiĝantaj arbarstrioj en limzono de Ĉeĥoslovakio kaj GDR: mizeriga sekvo de la kemia industrio.

Elvira Korbel, Vieno, A: Se vi ne konas tiujn, ni volonte mencias lernolibrojn por progresantoj: *Szerdahelyi: Esperanto 2; Faulhaber: Ne tiel, sed tiel ĉi; Lienhardt: Amuzaj dialogoj; Leintagne: Kiel diri...,* krome ni rekomendas uzi ankaŭ la facilajn *legolibrojn.*

Petik János, Balassagyarmat, H: Viaj trafaj problemoj estas, parte, ĉi-supre tuŝitaj. Ni aldonu, ke pri la ie-tie legeblaj «reguloj» (prefere diru: rekomendoj) oni devas praktiki ian grandanimecon, ja, kiel Kalocsay skribis: la ĉefaj principoj estas *klaro kaj bonsoneco.* Ankaŭ la *lingva kutimo* ŝanĝiĝas, kion ni mencias pri la uzo de la difina artikolo LA. Uzi «mem» antaŭ la akcentinda vorto tute ne estas hungarismo, tiel antaŭmetas ĝin ankaŭ la franca, itala k.a. Do? Pri idoj de *Kincsem* bonvolu kompreni, ke el ili ne ĉiuj iĝis elstaraj galopantoj, kvankam *ankaŭ* tiaj troviĝis. Bonan stilon eblas ĝui, sed en malbona facile troveblas la *nin* ĝenaj eroj; tamen ne forgesu: aliulojn eble *aliaj* eroj ĝenos. Parte en tio kaŝiĝas la kaŭzo de la Akademia singardemo. — Pri Petőfi-deklamado vi pravas — sed la memortabulo restas... (*E.F.*)

HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO + Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** + Arta redaktoro: **Eszter Kiss.** + Redakta komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Georgi Mihalkov, Péter András Rados, Zsuzsa Varga-Haszonits.** + Ĉefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechan, Aurel Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** + Budapest, pk. 193. H-1368. Telefono: 141-078, 334-194. + Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. + Respondeca eldonisto: **Tibor Vaskó.** + Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas ĉe ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215-96-162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato, + Abonprezo por jaro (ses numeroj) 78,- Ft, al eksterlando por unu jaro 96,- forintoj. + Peranto al eksterlando **KULTURA** (Budapest, P.O.B. **149, H-1389**). Abonprezo por unu jaro (ses numeroj) 11,- Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. + Presejo Szabadság MGTSZ Gyál — 83-543
Indexszám: 25 377 ISSN 0018-7704

Helpas vin en la lingvolernado la senlaŭtigila kaseda stereo-magnetofono ORION S4 250

Bendorapideco: 4,75 cm/s, precizeco 1,5 %
Nastabileco de la bendorapideco mezvalore ± 0,18 %
Larĝo de transiga strio-intervalo (Per FeO-bendo) 30-14000 Hz
Larĝo de transiga strio-intervalo (Per CrO_2 aŭ FeCr-bendo) 30-16000 Hz
Distordo: 1,5 %
Aŭtomata finpozicia ŝaltilo
Lumdioda kulminindikilo
Atenuo de malsurbendigo 70 dB
Signo/bruo-rilato 54 dB
Signo/bruo-rilato per bruatenuilo ANP 80 dB

VIA TELEFONO

1983 DEC 2 8

CB 812 SURTABLA TELEFONAPARATO KUN BUTONOJ

1502 BUDAPEST, Pf 64
Telefon: 669 - 400
Telex: 22 - 5842